

BULGARA **ESPERANTISTO**

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

**GRANDA FILO
DE
BULGARIO**

•

**E-INSTRUADO
KAJ TASKOJ**

•

KVARA ISEU

•

**EN FRATA
VJETNAMIO**

•

**HEROA
PASINTECO**

•

NI RECENZAS

•

**ETNOGRAFIA
KOMPLEKSO**

•

**ENLANDA
MOVADO**



JARO 55 • N-RO 9 • SEPTEMBRO • 86

GRANDA FILO DE LA BULGARA POPOLO



Naskita en 1911, en la regiono de Botevgrad, en la balkanmontara vilaĝo Pravce — de pratempo nesto de ribelemaj viroj, edukita de siaj gepatroj en la spirito de la plej valoraj popolaj virtoj, la juna Todor Jivkov tre frue adoptas la komunismajn ideojn, kunligas sian sorton kun la sorto de la bulgara laborista klaso. Ape-naŭ 17-jara presisto, li estiĝas aktiva funkciulo de la Komsomolo, kaj du jarojn pli malfrue — ankaŭ de la Bulgara Komunista Partio. Elkreskinte kiel altranga profesia revoluciulo, li estiĝas unu el la plej energiaj gvidantoj de la perarmila kontraŭfaŝisma batalo en Bulgario dum la jaroj de la Dua Mondmilito. Li estas unu el la organizantoj kaj gvidantoj de partizana brigado „Cavdar“, membro de la Stabo kaj vic-komandanto de Unua Ribela Operacia Zono. En la antaŭvespero de la Naŭaseptembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1944 li gvidas la Operacian Buroon, kiu akordiĝas la agojn de la armeformoj dum la decida sturmo kontraŭ la burĝa-faŝista diktaturo en la ĉefurbo, por la triumfo de la popola venko.

Dum la jaroj de socialisma konstruado Todor Jivkov manifestiĝis kiel talenta reprezentanto de la juna gvar-dio de partiaj gvidantoj, formigintaj sub la senperaj zorgoj de Georgi Dimitrov, la unua konstruanto de nova Bulgario. Sekretario de CK de BKP, membro de la Politika Buroo, unua sekretario kaj pli malfrue — ĝenerala sekretario de CK BKP, prezidanto de la Mi-nistra Konsilantaro kaj multjara ŝtatestro de PR Bul-gario, kune kun la Partio kaj la popolo li trapasis longan, ekskluzive riĉan kaj fruktodonan vojon, elkreskis kiel digna heredanto de Dimităr Blagoev kaj Georgi Dimitrov, kiel konsekvenca, fidela kaj inspirita daŭri-ganto de ilia granda faro.

La bulgaraj komunistoj, la tuta bulgara popolo fieras pri la gravega kontribuo de Todor Jivkov por forma-do kaj realigo de la Aprila linio — la Lenin'a ĝenerala linio de la Partio, konfirmita de la historia Aprila Plen-kunsido 1956. Ĉiuj ĉefaj eventoj en la vivo de nia so-cialisma socio, niaj sukcesoj en la interna kaj ekstera

politiko estas nedisigeble ligitaj kun lia nomo, estiĝinta simbolo de dinamikeco, de progresemaj ideoj kaj de la viviga Aprila Kurso, kiu transformis nian landon en modernan industrian socialisman ŝtaton, merite stan-rantan en la unuaj vicoj de la monda socia progreso.

Distinga trajto de Todor Jivkov en lia agado estas lia spirito de kreanto, de noviganto, dank' al kio li stre-bas apliki, disvolvi kaj pliriĉigi la marksismon-lenin-ismon en niaj landaj kondiĉoj.

Grandaj estas la meritoj kaj la rolo de Todor Jivkov por formado kaj efektivigo de la ekstera politika kurso de socialisma Bulgario. Fundamento de tiu kurso es-tas la rilatoj de frata amikeco inter Bulgario kaj Sove-tunio. Flama patrioto-internaciisto, li daŭrigis, disvolvis kaj multe altigis la bulgaran-sovetan ami-kecon kaj fratecon.

Popola Respubliko Bulgario, dank' al sia konstrua rolo en la internacia vivo, ĝuas grandan aŭtoritaton sur la monda areno. Grandparte tio estas ŝuldata al la personeco kaj la aŭtoritato de la ŝtatesto Todor Jivkov. Jam tri jardekojn li staras fronte de la Partio kaj de la ŝtato; li estas la homo, kun kiu renkontiĝas kaj traktas eminentaj ŝtatviroj el la tuta mondo; li partoprenas la pridiskutadon kaj solvado de kardinalaj problemoj de nia nuntempo, kontribuas por stabiligo de la reciproka fido inter la ŝtatoj, por serenigo de la internacia klimato. Li multon faris por transformo de la Balkanoj en zonan de paco kaj bonnajbareco. Sur la internacia areno li konfirmiĝis kiel unu el la plej estimataj ŝta-tistoj kaj politikistoj de nia tempo. Lia scipopvo trovi la plej ĝustan vojon por interkompreniĝo en politika dialogo, lia realisma rilato al la traktataj problemoj, lia rava personeco kontribuas por estigo de atmosfero de konfido, konfirmas ĉe la partnero la konvinkon, ke li traktas kun homo, kiu vere strebas al paco kaj reciproke profita kunlaborado, esprimante la interesojn kaj la volon de sia popolo.

La bulgaraj esperantistoj fieras pri la nomo kaj pri la personeco de Todor Jivkov — ĉarma kaj korvarma homo, fidela filo de la popolo, ligita al ĝi kiel la antikva Anteo — al la Tero, pri lia pozitiva rilato al la internacia lingvo Esperanto.

En siaj memuaroj lia kunvilaĝano Marin Bonĉev skribas, ke en sia junaĝo li amikis kun Todor Jivkov kaj Marin Rajĉinov, kiuj havigis al li progresemajn librojn. „Sub ilia influo, li skribas, mi komencis lerni Esperanton. Krome, Todor Jivkov estis inter la plej arda adeptoj de abstinado.“ La eminenta bulgara es-perantisto-veterano Ivan Krestanov — iama instruisto kaj gvidanto de E-kurso en Botevgrad, atestas ke unu el la partoprenantoj en lia kurso estis la lernanto el la gimnazio en Botevgrad Todor Jivkov. En 1961 Ivan Krestanov vizitas sian iaman lernanton kaj kursanon Todor Jivkov, lige kun lia 50-jara jubileo. En bona humoro, ili rememoras pri la jaro 1926, kiam Todor Jivkov lernis Esperanton en la gvidata de Krestanov E-kurso. Krestanov disigis kun Todor Jivkov, plene konvinkinte, ke li restis fidela amiko de Esperanto. Alia esperantisto-veterano — Vasil Bozarov, skribas ke en la lernejo 1925-1926 en la gimnazio estis fon-dita lerneja E-societo, kies sekretario li estis. „Ka-marado Todor Jivkov, — rememoras Bozarov, — lernis Esperanton, vizitadis la kunvenojn de nia E-socie-to, en kiuj ni parolis pri interkompreniĝo de la popoloj, kontraŭ la milito.“

Ankoraŭ multajn jarojn estu viva kaj sana nia unua partia kaj ŝtata gvidanto Todor Jivkov — batalanto por paco kaj amikeco inter la popoloj kaj granda amiko de la esperantistoj!

Nano KJUĈUKOV,
vicprezidanto de Bulgara Esperan-
tista Asocio



NIAJ INSTRUPROBLEMOJ KAJ TASKOJ

Ing. Angel TODOROV,
sekretario de BEA

Analizo de la instru-eduka strukturo de la membraro de BEA evidentigas, ke ekzistas favoraj kondiĉoj por plua plibonigo de la asocia laboro kaj por aktiviĝo de ĝiaj membroj.

Oni tamen ne devas forgesi, ke la relative alta nivelo de instruileco de la asociaj membroj principe postulas serĉadon kaj aplikadon de pli perfektaj formoj, metodoj kaj rimedoj por laboro kaj edukado, samkiel por efiki sur la konscion kaj sintenon de la esperantistoj, por aktiviĝo de ilia krea agado.

La nova E-lernojaro 1986/87 estos ligita kun la celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto. Ĝi devas esti laŭeble plej bone organizita kaj la plenumo de tiu tasko postulas altan konscion kaj maksimumajn forlostreĉojn fare de ĉiuj esperantistoj.

Dum la jubilea lernojaro ni devas atingi novajn sukcesojn en la disvastigado de Esperanto inter civitanoj kaj aparte inter junuloj kaj lernantoj.

Estas neceso, ke ĉiuj distriktaj kaj societaj estraroj de BEA aktiviĝu kaj eklaboru laŭplane, komisiante konkretajn taskojn al la respondeculoj en ĉiuj direktoj: administra, organiza kaj precipe la instrua. Tre grave estas ankaŭ labori por altiro de pli granda nombro da kunlaborantoj-volontuloj.

Omaĝe al la jubilea jaro, ni strebos al ĉiam pli bona organizo kaj planado, al aplikado de ĉiuj novaj formoj de instruado kaj disvastigo de Esperanto, kio grave kontribuos por plua evoluo de la E-movado en nia lando.

Al kio ni devas turni plej grandan atenton dum la preparado de la nova lernojaro?

— al la informa propaganda laboro — per afiŝoj, estetikaj aranĝitaj vitrinoj, ekspozicioj, atentokaptaj propagandaj materialoj;

— al aplikado de novaj instrumentodoj; de novaj instru-teknikaj rimedoj — magnetofonaj surbendigoj, filmoj, lumbildoj, sugestopediaj kursoj kun alte kvalifikitaj instruistoj; organizado de kursoj por ĉiuj gradoj en nia plej gran-

da kaj moderna kursejo en Pisanica; daŭrigo kaj disvastigo de la foresta studado;

— anoncado pri novaj kursoj pere de la radio, televido, centra kaj loka gazetaro;

— kulturaj aranĝoj kun partopreno de elstaraj E-artistoj, aktoroj el Bulgara E-Teatro k. a.

— realigo de kontaktoj kun la distriktaj kaj urbaj estraroj de partiaj kaj publikaj organizaĵoj, fakoj pri popola klerigo, komsomolaj kaj sindikataj organizoj, por regule informi ilin lige kun la celebrado de la jubilea jaro de Esperanto;

— ĉiuj distriktaj kaj societaj estraroj de BEA devas fari ĉion necesan por pli bone organizi la kursojn por progresintoj (II kaj III gradoj), por realigi diversajn formojn de praktikado de Esperanto. Ĉar nome la ofta uzado de la lingvo estas plej grava kondiĉo por ĝia aktiva ekposedo.

La ŝtata kaj partia ordono pri plialtigo de la kvalito plene rilatas ankaŭ nian agadon de soci-kultura organizo. Ni devas labori por senĉesa plibonigo de la lingva nivelo de ĉiuj membroj de BEA.

La Distriktaj Estraroj devas denove pritaksi la kvalitojn de la instru-kadruloj, inkluzive tiujn, kiuj diplomiĝis al la komenco de la nova lernojaro 1986/87, por ke ili estu plej bone distribuitaj kaj uzataj dum la jubilea jaro.

La instruistojn, kiuj gvidas kaj gvidos kursojn, oni devas elekti precipe inter la jam diplomitaj personoj. Kiam oni ne povas certigi tian lektoron por III grado (kun sukceso almenaŭ „bona“), oni rajtas ofisigi neregulan lektoron, sed nur kun la konsento de la sekretario pri instrulaboro kaj kun aprobo de la instru-komisiono. Tiam konsenton oni devas peti ĝustatempe.

La ekzamenojn por la diversaj gradoj oni okazigu laŭ la regularo (la komisiono ĉiam devas konsisti el diplomitaj instruistoj. La nomojn de l'membroj de la komisiono oni enskribu en la ekzamenprotokolon kaj en la diplomojn). La ekzameno por III grado ĉiam okazu en ĉeesto de reprezentanto de la instru-komisiono.

Ciu kursgvidanto, pere de la respondeculo pri instru-laboro ĉe la respektiva DE de BEA, devas prezenti nomaron de la kursanoj (nomo, ĝusta adreso, klereco kaj profesio, grado de la kurso, loko kaj tempo de ĝia okazigo) kaj sian propran adreson. Antaŭ la ekzamenoj oni postulu pere de la respondeculo pri instru-laboro la numerojn de la diplomoj kaj nomaron de la ekzamenkomisiono. (Tiu postulo estas ligita kun la enkonduko de komputera prilaboro de la donitaĵoj en BEA). Oni konsideros nevalidaj diplomojn sen numeroj kaj tiajn neregistritajn en la komputero. Tio validas por la diplomoj de II, III kaj metodika (por instruraĵoj) gradoj.

La Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj ĝia filio en Varna, paralele kun la ĝisnunaj formoj de instrulaboro kaj popularigo de la lingvo, zorgu alproprigi ankaŭ novajn: kursoj por tradukistoj, seminarioj por diplomitaj instruistoj, instrukcioj pri prononcado, oratoraj konkursoj, sugestopedia metodo de instruado. Oni daŭrigu la tradicion de serĉado de novaj formoj demonstrantaj la aplikon de Esperanto en diversaj sferoj de la vivo (de ĵurnalistoj, teknikistoj, medicinistoj, fervojistoj, poŝtistoj, aktoroj, pentristoj, kino-foto-amatoroj k. a.)

Oni daŭrigu la iniciaton de Urba Estraro de BEA en Sofio pri organizo de dutagaj renkontiĝoj de direktoroj kaj vicedirektoroj de mezaj politeknikaj kaj fakaj lernejoj en IEK-Pisanica, dum kiuj oni realigas ciklon da lekcioj. Ĉi-jare ili estos pri temoj:

— informado pri la Internacia Lingvo kaj ĝia 100-jara jubileo;

— la instru-laboro en la lando, fakultativa lernado de la lingvo, la eksperimentoj en 8-a lernejo „Vasil Levski“ kaj en la Nacia Lingva Lernejo en Gorna Banja (Sofio);

— celoj kaj agado de IEK en Pisanica kaj Varna;

— la internacia E-movado kaj ĝia varia agado;

— la korespondado de la esperantistoj kiel rimedo por internacia edukado kaj aplikado de la devizo: „Per Esperanto al paco, amikeco kaj internacia kompreniĝo.“

La Distriktaj Estraroj en la pli grandaj lokaj sistemoj provu organizi urban aŭ distriktan kurson por instruistoj, kaj samtempe ili aktive partoprenu en la jam organizitaj de la Instru-Komisiono ĉe BEA kursoj.

La instruistoj, kiuj gvidas la klasojn por fakultativa lernado de Esperanto en lernejoj, devas turni apartan atenton al la instru-eduka laboro, al la korespondado de lernantoj kun eksterlandaj lernejoj. Ili devas klarigi la statuton, la strukturon, celojn kaj taskojn de BEA, aktive partoprenu en la arangoj de la kluboj por internacia amikeco; informi la lerneajn estrarojn pri la agado de la grupoj, kiuj lernas Esperanton, pri arangoj, organizitaj dum la lerno-periodo, pri sukcesoj de la lernantoj dum festivaloj, recitaloj k. a. naciaj kaj lokaj E-manifestiĝoj. La samajn informojn ili prezentu al la distriktaj estraroj kaj al la sekretario pri instru-laboro ĉe BEA.

Honore al la jubilea jaro 1987, per komunaj fortoj ni faru ĉion necesan por la sukcesa solvo de tiuj ĉi ekskluzive gravaj taskoj!

**KARAJ LEGANTOJ,
LA ABONKAMPANJO POR 1987 JAM KOMENCIĜIS! NE PROKRASTU! ABONU REVUON**

„BULGARA ESPERANTISTO“

MONATA ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

„BULGARA ESPERANTISTO“ ESTAS UNU EL LA PLEJ MALNOVAJ E-REVUOJ EN LA MONDO — FONDITA EN 1919

„BULGARA ESPERANTISTO“ TRAKTAS AKTUALAJN PROBLEMOJN DE LA E-MOVADO EN BULGARIO KAJ EN ALIAJ LANDOJ

„BULGARA ESPERANTISTO“ ESTAS LIBERA TRIBUNO DE LA LEGANTOJ

„BULGARA ESPERANTISTO“ DISPONIGAS AL VI INTERESAJN ORIGINALAJN VERKITAĴN EN ESPERANTO AŬ TRADUKITAĴN LITERATURAJN VERKOJN DE BULGARAJ KAJ FREMDAJ AŬTOROJ.

Jarabono: por Bulgario — 2,90 lv.
por socialismaj landoj — 5,42 lv.
por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv.
(aŭ egalvaloro en nacia valuto)

ABONU TUJ PERE DE REPI!
ABONIGU ANKAŬ VIAJN EKSTERLANDAJN AMIKOJN! LA PLEJ BELA DONAĈO POR ILI ESTOS JARABONO DE „BULGARA ESPERANTISTO“ POR 1987!


ALILANDAJ LEGANTOJ POVAS ABONI LA REVUON ĈE LA CENTRA OFICEJO DE UEA — NIEUWE BINNENWEG 176, 3015 — BJ ROTTERDAM, NEDERLANDO.

NE FORGESU! NUN PLEJ GRAVA TASKO DE ĈIU E-SOCIETO, DE ĈIU E-AKTIVULO ESTAS NEPRE PLENUMI LA DECIDON DE LA 41-a KONGRESO DE B E A: ĈIU ESPERANTISTO—ABONANTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“ HONORE AL LA 100-JARIĜO DE ESPERANTO VARBU PLIAJN NOVAJN ABONANTOJN DE „BULGARA ESPERANTISTO“, EN BULGARIO KAJ EKSTERLANDE!

LASTA LIMDATO: 10-A DE DECEMBRO 1986.
ATENTON! LA ELDONKVANTO ESTAS LIMIGITA!

LA REDAKCIO

ISEU '86 — ATINGOJ KAJ PROBLEMOJ



Dum la solena inaŭguro de ISEU'86: salutparolas d-ro Árpád Mathé (Hungario)

Jam kvaran fojon — de la 22-a ĝis la 25-a de julio — la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Veliko Tŕrnovo organizis la Internacian Someran Esperanto-Universitaton (ISEU). Dum unu semajno en la aŭlo de la universitato „Kiril i Metodij” sonis Esperanta parolo: la ĉi-jaran sesion de ISEU partoprenis ĉirkaŭ 120 esperantistoj el Bulgario, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Sovetunio, Japanio, Finnlando.

Cu jam bonega tradicio? Espereble — jes! En sia salutparolo dum la solena malfermo de ISEU-86 la rektoro de la universitato „Kiril i Metodij” prof. d-ro Stanju Georgiev diris: „Ni devas ĝuste pritaksi la signifon de la Kvara Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Tŕrnovo: ĝi enŭiĝas inter la plej gravaj kulturaj eventoj en nia urbo, en kiu oni eklernis Esperanton organizite jam en 1888. La ĉi-jaran sesion de ISEU partoprenas reprezentantoj de multaj landoj. Ilia konatiĝo kaj proksimiĝo pere de la Internacia Lingvo kontribuas por forigo de la danĝero de nuklea konflikto, de detruo de la kulturo, neniigo de la vivo. La gvidantaro de la universitato en Veliko Tŕrnovo, kiel konstanta gastiganto de tiu-ĉi reprezenta forumo, sentas neordinaran fieron kaj samtempe konscias sian devon al la E-movado. Estonte ni faros ĉion eblan, por ke studentoj kaj profesoroj en nia universitato lernu Esperanton”.

Ankaŭ la vic-urbestro de V. Tŕrnovo Stefan Karivanov esprimis sian kontentecon, ke ISEU estiĝas jam kultura tradicio, alte pritaksis la noblan rolon de Esperanto por amikiĝo kaj interkompreniĝo de la homoj, aldonante: „Estas agrable sciigi al vi pri la estonta konstruado de Esperanto-domo en la malnova urba kvartalo „Asen”, kio estos esprimo de nia aparta atento kaj zorgo pri la E-movado en nia urbo kaj en la distrikto”.

En la nomo de la Centra Estraro de BEA salutparolis Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto”. „Ĉiam pli kaj pli la programo de ISEU pliriĝas — li diris. — Eminentaj sciencistoj kaj sociaĝantoj el Bulgario kaj el aliaj landoj estas invitataj kiel lektoroj. La partoprenantoj akiras novajn konojn. ISEU pravas la praktikan aplikadon de Esperanto en

ĉiuj sferoj de la ĉiutaga vivo. CE de BEA alte aprezas ISEU kaj ĉiuflanke helpas ĝian pluan popularigon. Nia devo estas plu disvolvi tiun altvaloran kulturan E-arangon lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto”.

En la sama senco estis la eldiroj de docento Árpád Mathé, vic-prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de „Budapeŝta Informilo”, kaj de Sakari Kauppinen, ĝenerala sekretario de la Esperanto-Asocio de Finnlando.

La programo de la ĉi-jara sesio de ISEU estis vere varia. La partoprenantoj aŭskultis prelegojn pri kosmaj problemoj (docento Kiril Velkov), pri E-literaturo kaj poezio (Georgi Mihalkov), pri E-periodaĵoj kaj sportaj terminoj en Esperanto (d-ro Á. Mathé), pri bulgar-j-hungaraj interrilatoj en la filmarto (Donĉo Hitrov). Docento Viktoria Balogh (Hungario) parolis pri la helpo de matematika pensmaniero en E-instruado; Ljubomir Mihajlov kaj Neno Janev traktis ingvajnaj kaj gramatikajn problemojn, Olga Cankova parolis pri la ideo de internacia lingvo en Bulgario; ing. Simon (GDR) informis pri la verkado de forstista E-terminaro; S. Kauppinen rakontis pri la evoluo de la E-movado en Finnlando.

Multaj el la prelegoj estis ilustritaj per projekciado de lumbildoj. Tio aparte kontribuas al la krea atmosfero en la universitata aŭlo, kiu estis la ĉefa aŭditorio de ISEU.

La varia temaro kaj la alta scienca kaj lingva nivelo de la prelegoj provokis grandan intereson de la partoprenantoj, kiuj vikle diskutis la starigitajn problemojn, dividis sperton. Ĉio ĉi pliriĝis la prelegojn mem, kreis kondiĉojn por reciproka interŝanĝo de informado. La interŝanĝo de opinioj kaj de sperto daŭris ankaŭ en la universitata manĝejo kaj dum promenadoj en la urbo.

Laŭ decido de CE de BEA la ĉi-jara sesio de ISEU estis organizita de la Distrikta Estraro de BEA en Veliko Tŕrnovo kaj la rezultoj estis tre bonaj. La agemaj kaj ambiciaj organizantoj faris grandan preparlaboron. Al ĉiuj partoprenantoj estis disdonitaj plaĉe presita programo, memorinsigno, specialaj notkajeroj, multkoloraj foto-prospektoj pri Veliko Tŕrnovo. Multloke en la urbocentro estis aranĝitaj specialaj standoj kaj afiŝoj, kiuj informadis la loĝantaron pri ISEU.

Laŭ la programo ĝis la tagmezo oni aŭskultis prelegojn kaj posttagmeze estis organizitaj vizitoj kaj ekskursoj al interesaj kulturaj kaj historiaj objektoj: Centra Urba Artgalerio, Muzeo de la Bulgara Renesanco, arkitektura historia rezervejo „Carevec”. Monaĝejo de Kapinovo. Aparte menciindas la tuttaga ekskurso al la Monaĝejo de Trojan kaj al vilaĝo Oreŝak, kie troviĝas la fama Konstanta Ekspozicio de Popolaj Artverkoj, kaj al la Naturscienca Muzeo en vilaĝo Ĉerni Osám.

Agrabla surprizo estis la monologo laŭ Dostojevskij plenumita de la aktoro Oleg Popkov el la Leningrada E-teatro, kiu multe pliriĝis la amuzan programon de ISEU.

Amikaj interparoloj kaj diskutoj, abundaj impresoj, vizitoj kaj ekskursoj — ĉio ĉi multe kontribuis por la sukceso de la ĉi-jara ISEU, ambicie organizita far DE de BEA. Meritas laŭdajn vortojn la sekretario de DE de BEA en Veliko Tŕrnovo Leonid Senj, Olga Cankova, Maria Pejкова, k. a., kiuj estis ĉiam je dispono de la partoprenantoj, pretaj helpi kaj informi ilin.

Nia komuna devo estas jam de nun pensi pri plua variigo de la temaro de la estontaj ISEU, pri ĝustatempa altiĝo de spertaj kaj interesaj prelegantoj — bulgaraj kaj alilandaj, pri interesiĝo de pli vastaj soci-kulturaj medioj al la laboro de ISEU, por ke ĝi plene meritu la noblan kaj honoran nomon de populara esperantista universitato. Ankaŭ la objektoj por



Amikaĵmemorfoto: (de maldekstre dekstren) Misako Harada (Japanio), Leonid Senj (Bulgario), Sakari Kauppinen (Finnlando), doc. Viktoria Balogh kaj d-ro Árpád Máthé (Hungario)

ekskursoj devas esti zorgeme elektitaj, por ke la vizitantoj havu kiel eble plej plenan impreson pri la malnova historio de la lando kaj pri ĝia nuntempa vivo.

Necesas ankoraŭ pli vasta anticipa informado pri ISEU en Veliko Târnovo sur la paĝoj de Esperantaj eldonoj en diversaj landoj, tiel ĝi estigos ĉiam pli kaj pli populara ankaŭ inter alilandaj esperantistoj.

Kaj jen kelkaj impresoj de niaj eksterlandaj gastoj pri la Kvara ISEU'86:

Docento VIKTORIA BALOGH (Hungario):

— Duan fojon mi partoprenas ISEU en Veliko Târnovo. Min allogas la varieco de la prelegoj, la alta profesia kaj lingva nivelo de la lektoroj, la gastamo de la organizantoj kaj — ne lastloke — la ĉarmo de tiu mirinde pitoreska urbo. Mi tre ĝojas, ke ankaŭ mi prelegis, dividante mian sperton de matematikistino en lingvoinstruado. La ĉi-jara arango estis perfekte organizita, kio disponigis al ni bonegajn laborkondiĉojn.

SAKARI KAUPPINEN (Finnlando):

— Mi estas vere surprizita pro ia interesa maniero de organizado de ISEU, kio ebligis al mi akiri novajn konojn kaj konatiĝi kun multaj interesaj personoj. La programo proponis emociajn momentojn dum la ekskursoj, kiuj konigis al ni parton de via bela lando. Min ravis la varma gastamo kaj amika rilato de niaj gastigantoj.

HELGA PLÖTNER, pentristino (GDR):

— Unuan fojon mi partoprenas ISEU en via lando kune kun mia 16-jara filino Jana. Ĉi tie ŝi mem konvinkigis pri la amika internacia etoso, pri la valoro de Esperanto en senperaj kontaktoj kaj pri akiro de sciencopopularaj konoj. Mi havis eblecon ankaŭ multe pentri dum la lekcionoj — nun mi havas tutan galerion da interesaj portretoj de partoprenantoj en la universitato. Kaj certe multajn novajn amikojn!...

Veliko Târnovo — Sofio
Julio, 1986

Radi BANCEVSKI


UNIKA EKSPOZICIO DE ESPERANTAJ LERNOLIBROJ

Dum la tagoj de ISEU en la Domo de Sindikatoj en Veliko Târnovo estis aranĝita unika ekspozicio de Esperantaj lernolibroj, posedado de la esperantisto-veterano kaj multjara aktivulo Hristo Dolĉinkov.

En ĉeesto de la partoprenantoj en ISEU kaj de multaj amikoj de Espeanto la ekspozicion inaŭguris Leonid Senj, sekretario de DE de BEA. En sia mallonga parolado li rakontis pri la E-aktivado de Hristo Dolĉinkov, kiu jam pli ol duonjarcenton dediĉas sian liberan tempon kaj multajn fortojn al prospero de la E-movado en Veliko Târnovo kaj la distrikto. Esperanton li lernis aŭtodidakte. Jam kiel junulo Dolĉinkov komencis kolekti E-lernolibrojn, eldonitajn en diversaj landoj. Tiutempe li jam havis multajn korespondamikojn eksterlande, kun kiuj li interŝanĝas lernolibrojn kaj ĉiam pli kaj pli riĉigis sian kolekton. Nun ĝi nombras pli ol 200 diversnaciajn eldonojn de E-lernolibroj.

La vizitantoj konatiĝis kun E-lernolibroj, eldonitaj en Bulgario, Pollando, ĈSSR, GDR, Sovetunio, Jugoslavio, Nederlando, Anglio, Hispanio, Norvegio, Finnlando, Ĉinio, Japanio, Usono, Kanado, FRG, Italio, Belgio, Norvegio, Svedio, k. a. En tiu ĉi ekspozicio troviĝas ankaŭ multaj diversnaciaj Esperanto-vortaroj. Kelkaj el tiuj eldonoj nun estas bibliografia raraĵo, kio aparte plialigas la valoron de la ekspozicio.

D. S. H.



Hristo Dolĉinkov (en la mezo) klarigas la enhavon de la ekspozicio al vizitantoj

Fotoj: Veselin DOLĈINKOV



UNU EL LA UNUAJ

(La ekzemplo de Evtiĉ)

so, pro la granda energio en la revolucia batalo Evtiĉ tre rapide gajnas la korojn de la honestaj homoj.

Evtiĉ estis kiel „Levski“ — ĉiam persekutata (kiel komunisto), kaj ĉie bone akceptata de la laboristaro. Li ofte estas maldungata de la fabrikistoj, ĉar li amas la ordinarnajn homojn, zorgas pri ili. . . . Eĉ ŝerce li ofte diradis: „Denove mi devas promenigi miajn pantalonojn“, — kio signifis, ke denove li estas senlaborulo.

De sia infanaĝo, ĝis la fino de sia vivo Evtiĉ estis abstinenculo. Li konsideris la abstinencadon nedisigebla parto de siaj moralaj principoj de revolucio, tial plej aktive partoprenis la agadon de la abstinencula societo en Gabrovo.

Evtim Apostolov estis fervora esperantisto. Sur lia brusto ĉiam brilis la verda stelo. Ne hazarde li estis reprezentanto de la gabrova esperantistaro en la kongreso de Bulgara Esperantista Asocio en urbo Sevlievo, 1938.

En la komenco de 1942 oni komisiis al Evtiĉ gvidi militkomisionon. Li tuj komencis esplori la plej gravajn militobjektojn en la regiono, konstante zorgis pri kolektado de armiloj kaj de diversaj materialoj por sabotado. Krom tio li zorgis pri organizo de sekretaj kaŝejoj en la domoj kaj en la arbaro, pri varbado de partizanhelpantoj, pri formado de batalgrupoj, k. a.

En junio 1942 estis formita la unua partizana taĉmento en la regiono de Gabrovo kaj ĝia komandanto fariĝis Evtim Apostolov — Velko (Velko estis lia partizana kromnomo).

Tiu ĉi taĉmento plenumis vicon da sabotajtoj: detruo de reloj de la transbalkana fervojlinio, de fabrikaj elektroduktoj k. a.

Laŭ sekreta informo, en la nokto kontraŭ la 7-a de septembro 1942 devis fovehuri ŝarĝvagonaro de Gabrovo al stacidomo „Careva Livada“ (nun Vârbanovo), transportanta materialojn por Hitlera Germanio. La partizana taĉmento devis agi senprokraste!

Dum la realigo de tiu operacio eksplodas mino kaj mortvundas la komandanton Evtiĉ kaj la partizanojn Ilia Bjalkov, Penĉo Stojanov kaj Stefan Ĥârvatov. Tio estis tre granda malfeliĉo por la proletaro de Gabrovo.

Tiuj kaj multaj aliaj bravuloj falis en kruela batalo kontraŭ la faŝista malamiko. En la memoro de la vivantoj ili restis kiel ekzemplo de profunda fideleco al sia klaso kaj al sia popolo!

Aristo ORLOVSKI — eksa estro de la Gabrovo-Sevlieva partizana taĉmento

Frumatene la 8-an de septembro 1942 en la distrikta komitato de BKP en Gabrovo alvenis malĝoja sciigo: pereis la komandanto de la unua partizana taĉmento — Evtim Apostolov — Velko, kaj aliaj tri partizanoj.

Evtim Apostolov — Evtiĉ, tiel ni nomis lin, naskiĝis la 23-an de aŭgusto 1911 en vilaĝo Leva Reka — regiono de Trân, en malriĉa familio. Apenaŭ 3-jara, li orfiĝis kaj oni donis lin en la orfejo en vilaĝo Sipka, regiono de Kazanlâk. Tie li loĝis kaj lernis ĝis 1925.

En 1930 Evtiĉ ekloĝas en Gabrovo kaj komencas labori en la fabriko de Ĥristo Metev. Baldaŭ li amikiĝas kun progresemaj laboristoj. Dank' al tiu amikeco li formiĝas kiel konscienca kaj aktiva aganto de la revolucia laborista movado en la regiono de Gabrovo.


En 1935 li jam estas membro de la distrikta komitato de la Komsomolo. En la sama jaro, pro denuncio, Evtiĉ estas arestita. Malgraŭ la kruela torturado en la policejo, li perfidas neniun. Evtiĉ estas kondamnita al 5-jara malliberigo, sed lia revolucia konscio ne estas deprimita.

En la malliberejo, en la nomo de la politikaj malliberuloj Evtiĉ skribas proteston kontraŭ la krueleco de nove veninta direktoro. Pro tio li estas severe punita.

Post eliro el la malliberejo, en 1937 Evtiĉ denove aliĝas al la revolucia batalo en Gabrovo.

En 1938 Evtim Apostolov estas elektita membro de la distrikta komitato de BKP. La partia komitato komisiis al li respondeci pri tria partia regiono en Gabrovo kaj en la komenco de 1940 li fariĝas respondeculo pri sindikataj aferoj ĉe la distrikta komitato de BKP. Ĉiujn siajn taskojn li plenumas ĝustatempe, kun granda lerteco.

Pro sia arda sindonemo al la laborista kla-



LA INTERNACIA LINGVO EN SVISLANDO

Esperanto havas longan tradicion en Svislando. La Svisa Esperanto-Societo estis fondita jam en 1902 kaj per tio ĉestis la dua nacia societo por propagando de la Internacia Lingvo en la mondo. En la sekvanta jaro komencis aperi la organo de la societo kiu jam havas okdek kompletajn jarkolektojn. Longe ĝia titolo estis „Svisa Espero“, sed antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis modernigita al „Svisa Esperanto-Revujo“. Ĝi aperas monate, en ofsetpresoj.

La Svisa Esperanto-Societo estas aligita al UEA, sed ĝi ne estas la sola organizaĵo en Svislando, kiu okupiĝas pri Esperanto. Konsiderindan rolon ludas la Kultura Centro Esperantista, kiu estis fondita en 1968 kun la celo disvastigi Esperanton en kulturaj kaj lernejoj medioj, por prepari modernajn metodojn de instruado, por organizi kursojn kaj seminariojn, por fondi libroservon ktp. La Svisa Esperanto-Societo (SES), nun estas prezidata de Claude Gacond — li kaj d-ro Arthur Baur prizorgas la elsendojn de Svisa Radio Internacia. La Kultura Centro Esperantista (KCE) estas organizita kiel fondumo. Al ĝi estas ligita la gastejo „Edmond Privat“, kiu laŭjure estas memstara fondumo. Ĝi posedas en La Chaux-de-Fonds sep domojn, en kiuj estas i. a. instalitaj la sekretarioj de KCE kaj la salonoj por ties kursoj kaj por la Internacia Fiera Altlerr nejo. En la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds troviĝas ankaŭ la Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo (CDELI), kiu posedas unu el la plej riĉaj en la mondo bibliotekoj de libroj en Esperanto, sed ankaŭ de libroj en kaj pri aliaj planlingvoj.

Krome, ekzistas en Svislando la „Junularo Esperantista Svislanda“ (JES), kiu kiel kolektiva membro estas aligita al SES, la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, kaj en Genevo havas sian sidejon la Kooperativo de Literatura Foiro (Lf-koop), kiu eldonas plurajn revujon.

La svisa Esperanto-Societo estas organizita kiel societo de individuaj membroj, sed en 12 lokoj tiuj organiziĝis kiel lokaj grupoj.

En kontribuado, kiu aperis en „Esperanto en perspektivo“, por karakterizi la situacion en Svislando, mi skribis jenajn rimarkojn: „La svisa esperantismo neniam fariĝis amasmovado, versajne pro tio, ke la svisoj sentas la bezonon de internacia lingvo malpli ol aliaj po-

lojoj. Homoj, kiuj parolas plurajn lingvojn (kaj la lingvoj parolataj en Svislando estas grandaj kulturlingvoj), estas proporcie pli multnombraj ol aliloke, kaj dank' al tio ili havas grandan facilecon en internaciaj kontaktoj“. Tiu stato de la aferojne ŝanĝiĝis intertempe. La ĝenerala rilato al Esperanto estas afabla, sed la emo lerni ĝin tute ne estas disvastigita.


En la historio de Esperanto en Svislando kelkaj personoj ludis gravan rolon. La unua menciinda estas Hector Hodler, filo de la plej fama svisa pentristo. Li vivis de 1887 ĝis 1920 kaj elstaras kiel kunfondinto de Universala Esperanto-Asocio kaj ties unua direktoro. En la unua „Enciklopedio de Esperanto“ (1933) oni povas legi pri li: „Hodler estis idealisto, sed kun granda praktika sento. Li pensadis senĉese, kiel li povus fari Esperanton praktike uzebla, per tio preparante internacian tuthomaran popolon“. Amiko de Hector Hodler estis Edmond Privat (1889—1962). Ili kune lernis ta Internacian Lingvon kaj kune eldonis revueton „Juna Esperantisto“.

Privat plenumis la plej altajn oficojn en la E-movado kaj estis nomita honora prezidanto de UEA en 1951. Li oferis sian privatan karieron al Esperanto kaj nur en 1945 fariĝis profesoro en la universitato de Neuchâtel. Li estis eminenta verkisto kaj en la franca kaj en Esperanto. Lia „Vivo de Zamenhof“ estiĝis klasika literaturaĵo. Unu el liaj meritoj, ankaŭ nun aktuala, estas la programoj en Esperanto de Svisa Radio, kiujn li iniciatis en 1946 kaj plenumis ĝis 1962. Inter la svisaj esperantistoj, kiuj ludis rolon en UEA kiel gvidantoj, estas ankoraŭ menciindaj Eduard Stettler, Hans Jakob kaj Hans Kürsteiner.

En Svislando okazis ĝis nun ses universalaj kongresoj: Genevo (1906), Berno (1913), Genevo (1925), Berno (1939), Berno (1947), Lucerno (1979). Okaze de la berna kongreso en 1939 aperis la Svisa Antologio, kiun eldonis „Literatura Mondo“, kaj en 1979 — la libro „La Fenomeno Svislando“, verkita de Arthur Baur kaj eldonita de la Svisa Esperanto-Societo.

La svisa E-movado havas fortajn radikojn kaj riĉan historion, sed el vidpunkto de aktualeco plej interesa evoluo estas observebla en la Chaux-de-Fonds, kiu fariĝis vera esperantista centro. La sorto de la Esperanto-programoj de Svisa Radio Internacia aliflanke ne dependas de la svisaj esperantistoj, sed de la eksterlandaj, kiuj per siaj korespondaĵoj manifestas sian intereson pri ilia daŭrigo kaj pliampleksigo,

Arthur BAUR



SINDONA KULTURAGANTO

La E-veterano Kosta Danailov Konstantinov, honora membro de BEA, estas naskita la 25-an de marto 1906 en la historia vilaĝo Jeravna, distrikto de Sliven.

La unuajn informojn pri Esperanto li ricevis de sia parenco Krăstju Mirski el urbo Kotel, unu el la fondintoj de BEA en Veliko Tărnovo en 1907, kaj ankaŭ de sia onklo Krăstju Stančev, kiu, kiel ĉefredaktoro de ĵurnalo „Zarja“, disponigis al la esperantistoj tutan paĝon de la sabata numero de tiu ĉi ĵurnalo. Sed en la gimnazio de Kotel, kie Kosta Konstantinov finis tri klasojn, ne estis Esperanto-kursoj. Esperanton li lernis en urbo Sliven, en la lasta klaso de la Slivena knaba gimnazio, en la lernojaro 1923/24. Laŭ iniciato de la staĝanto-instruisto pri literaturo Kiprie Konstantinov (el urbo Ajtos) en la gimnazio formiĝis lernejana Esperanto-societo. Kosta Konstantinov estis aktiva membro de tiu societo kaj fariĝis ĝia sekretario. Kipril Konstantinov gvidis Esperanto-kurson. Oni lernis la lingvon laŭ la lernolibro de Edmond Privat (Berlino, 1922).

Dum 1924/25 lernojaro Kosta Konstantinov estis instruisto en la elementa lernejo de vilaĝo Novo Paničarevo, en Stranga-montaro. Tie ni vidas lin ankaŭ gvidanto de Esperanto-kurso, kiun li organizis por siaj junaj kolegojn, laŭ la lernolibro de Atanas D. Atanasov (Sofio, 1924).

La sekvontan lernojaron li estiĝis studento de matematiko en Sofio, tie li komencis vizitadi kunvenojn de la sofiaj esperantistoj kaj partoprenis la nacian kongreson en 1926.

En 1932–34 Kosta Konstantinov estis instruisto en vilaĝo Ustrem, en Sakar-monto. Poste li fariĝis sekretario de la komunumo.

En 1936 lia adreso estis publikigita en la Monda adresaro „Poliglot“ — Praha, kun la aldono: „Mi deziras korespondi pri la homaj ĝojoj kaj ĉagrenoj“. Kompreneble, ĉiu homo havas kaj ĝojojn kaj ĉagrenojn kaj deziras ilin konfesi. Venis leteroj de samideanoj el diversaj landoj kaj li komencis viglan korespondadon.

En 1937 Kosta Konstantinov partoprenis la 24-an Esperanto-kongreson en Pazarĝik, kie li konatiĝis kun sia estonta edzino — Stojanka Maševa el la proksima vilaĝo Pištigovo. Ili geedziĝis kaj Kosta Konstantinov ekloĝis en Pazarĝik. Cetere, unue la familio translokiĝis de v. Ustrem en v. Pištigovo (en la jaro 1943, kiam li estis mobilizita kiel rezerva oficiro). En Pištigovo Maria, la fratino de Stojanka, kaj ŝia filo — Petko Mašev, estis partizanhelpantoj. Stojanka helpis sian fratinnon. La nutraĵon destinitan por la partizanoj ŝi kaŝis en sia loĝejo — ja la loĝejon de oficiro la policianoj ne kontrolis. En 1946 Kosta Konstantinov estis akceptita en la Bulgara Komunista Partio. Post la milito li partoprenis kursojn de rusa lingvo por gimnaziaj instruistoj kaj ek de la lernojaro 1946/47 komencis instrui rusan lingvon en la Pazaarĝika dua knaba gimnazio „Asen Zlatarov“. Regule li instruis rusan lingvon, fakultative — stenografion, kaj en lernantaj studrondoj — Esperanton. En la somero de 1947 kune kun siaj lernantoj li partoprenis la junularan laborbrigadon en Hainboaz — la Trapasejo de la Respubliko.

En Pazarĝik li aliĝis al la urba Esperanto-societo kaj estis membro de ĝia estraro. Ekestis jaroj de aktiva E-laboro. En 1974 li estis prezidanto de la distrikta E-estraro (vicprezidanto estis Stojan Tanev, sekretario — Petko Arnaudov) kaj aktive kontribuis por la konstruo de Esperanto-domo en Pazarĝik.

Kosta Konstantinov partoprenis plurajn enlandajn Esperanto-arangojn kaj la du universalajn kongresojn de Esperanto en Bulgario (en Sofio 1963 kaj en Varna 1978). Ekde 1980 li estas honora membro de BEA.

Petko ARNAUDOV

NOVA ŜANCO POR TERMINOLOGIO

FAKA APLIKADO KAJ TERMINARA KAOSO

Por ĉiuj esperantistoj, precipe la novaj, gravas la demando: por kio mi lernas la lingvon, kiel mi utiligu mian sciencojn? Ĉu ĝi servas ne nur al kongresa babilado kaj korespondanta spertintersaĝo pri vetero kaj personaj vivkondiĉoj — aŭ alivorte: Ĉu Esperanto taŭgas por profunde trakti specialajn temojn el mia profesia aŭ ŝatokupa sfero? La respondo konatas: principe jes. . .

Principe jes, se ekzistus terminaro pri la koncerna fako, se mi trovus en koncerna vortaro la terminojn, sen kiuj interkomunikado pri tiu speciala tereno ne eblas.

Car tiu manko evidentigis jam tre frue en la movada historio, esperantistoj-fakuloj jam antaŭ la 1-a Mondmilito komencis kompili fakvortarojn. Ili serĉis en la literaturo jam ekzistantajn esprimojn kaj kreis novajn vortojn, kie ili mankis.

Sed okazis, ke kolego el la sama fako, eble eĉ el la sama lando, ne sciante pri tia verko — aŭ ĉar, ĝi ne kontentigis lian bezonon — kompilis kaj eldonis alian vortaron. Precipe en la lastaj jaroj tiel estiĝis multaj duoblaĵoj kaj sinonimoj, malhelpaj por faka komunikado kaj kompromitaj por Esperanto en ekstermovadaj rondoj. (Plej konataj ekzemploj: la batalo inter komputilo — komputero — komputero k.a., resp. dato — datumo — dateno, donitajo).

UNUAJ PROVOJ PRI KUNORDIGADO

Vidante la danĝeron, kiu tiamaniere minacas precipe internacian planlingvon, en la 50-aj jaroj ISAE¹ kaj la Akademio de Esperanto starigis Terminologian Centron, kiu sub gvido de R. Haferkorn (FRG) klopodis unueciigi la

terminarajn laborojn por Esperanto. En 1970 R. Eichholz (Kanado) transprenis tiun taskon. Tradukante la germanan „Bilder-Dudeb“ (FRG) al „Esperanta Bildvortaro“ li kunlaborigis ĉ. 200 diverslandajn fakulojn. El la slipoj, per kiuj ili interŝanĝis siajn opiniojn, estiĝis, kvazaŭ krom-produkto, la „Slipara Vortaro“.

Nun, en la 80-aj jaroj, ekestis nova iniciato por kunordigi la pliiĝantajn, sed disajn kaj parte paralelajn klopodojn.

En la kadro de la Scienca Eldona Centro de UEA (SEC) en Budapeŝto kelkaj volontuloj starigis Terminologian Sekcion (TeS), kiu nun, post la — espereble provizora! — likvido de la Budapeŝta oficejo de SEC, rekte ligiĝas al UEA. La sekretario de TeS, Ivan Bujdos, Budapeŝto, kolektas adresojn de interesitaj fakuloj por interkonatiĝi ilin kaj instigi al kunlaboro en internaciaj, fake specialigitaj terminografiaj komisionoj. Kiel unuaj

Violin OLJANOV

EN FRATA VJETNAMIO

Miaj kontaktoj kun sudorienta Azio datiĝas de antaŭ 40 jaroj. Tiam, kiel vicĉefredaktoro de fako „Informoj por eksterlando“ en Bulgara Telegrafa Agentejo (BTA) mi sendis esperantlingvajn artikolojn pri nova, libera Bulgario ankaŭ en Hindocinion. Ni ricevis sciigojn, ke niaj materialoj estas favore akceptataj, kun avida ŝlamo legataj kaj disvastigataj eksterleĝe. Post la liberigo de Norda Vjetnamio el sub la franca regado, mi komencis persone korespondadi kun vjetnamaj esperantistoj. Mia unua korespondanto estis Nguyen Van Kunh, kiu laboris en la Centra Komitato de la Vjetnama Komunista Partio. Li estiĝis fondinto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA). Poste li estis oficigita ambasadoro de Vjetnamio en USSR. Tiam li vizitis Sofion kaj mi havis eblecon persone lin ekkoni. Pro tio por mi estas komprenebla la granda estimo, kun kiu la vjetnamaj esperantistoj parolas pri li.

Kaj jen, neatendite mi trafis malproksiman ekzotajn Vjetnamion.

UNUAJ IMPRESOJ. NEKUTIMA VARMEGO. FERMULA FENESTRON!

Post 17-hora flugado per la gi-

ganto IL-86 ni surteriĝis en Hanojon. Tuj post la elaviadigo nin alblovis varmega, humida aero. Ĉu ni eltenos? Sed baldaŭ nian atenton altiris la afabla bonveniga rideto de la prezidanto de VPEA Dao Anh Kha, kiu aperis ĉe la transa flanko de la lima bariero. Post frataj ĉirkaŭbrakoj li kaj funkcio pri gastigado ĉe la packomitato helpis al ni plenumi pli rapide la limajn formalojn. Ili nin trankviligis, ke ni tamen ne trafis la plej malbonan sezonon — nome julion-aŭguston, kiam la loka klimato estas plej malfacile tolerebla, precipe de alilandanoj, pro la varmega humida aero.

Per „Volgo“ ni direktiĝis al la ĉefurbo. Kompreneble, survoje nin entuziasmigis abunda tropika verdado: palmoj, bananarboj, rizejoj kaj multaj nekonataj por ni arboj, planto, floroj. . . Enirante la urbon, nin konsternis la neimagebla svarmo da biciklistoj kun tipe vjetnamaj ĉapeloj. Ambaŭ flankoj de la stratoj estas plenstopitaj de ili kaj la aŭtomobiloj devas interŝoviĝi en la mezo. La sperta ŝoforo zigzagis lerte, tamen mi povis imagi, ke fakte tio tute ne estas facila afero. Bone, ke la stratoj estas rektaj. La domoj estas unu- kaj duetagej kaj antaŭ ili — senombraj

etkomercistoj, precipe virinoj kaj infanoj. Ĉie sur la trotuaroj ludas multaj infanoj.

Fine ni haltis kaj eniris malnovan, tamen komfortan kaj puran hotelon. Reviviga freŝeco venanta de grandaj ventoliloj muntitaj sur la plafonoj nin alblovis. Do ni vidis, ke estas oazo, en kiuj oni povas vivi komforte. Enirinte mian ĉambron, mi sentis la agrablan freŝegan fluon de ventolita aero. Laŭkute mi malfermis la fenestrojn. Sed poste mi vidis instrukcion, ke oni devas fermi la fenestrojn, kiam la ventoliloj funkcias. Pripensinte, mi komprenis ĝian pravecon. Ĉe ni vintre oni fermas la fenestrojn, por ke la varmo ne eliru: tie ĉi, kontraŭe, oni fermas ilin, por ke la freŝeco ne forkuru.

Kiam vespere ni sidigis en la restoracio por vespermanĝi, mia kunvojaĝantino d-rino Cveta Stamenova rifuzis la afable proponitajn mangobastonetojn far la juna kelnerino, kiu unue ne povis kompreni ŝian deziron, tamen fine alportis kuleron kaj forkon, kaj ĉio estis en ordo, ni estis pretaj por manĝi nian unuan supon el. . . algoj. Sed ni estis lacaj kaj ne havis fortojn pensi el kio estas preparitaj la mangajoj. Post la vespermanĝo ni tuj iris por dormi.

Matene min vekis forta frapo je la pordo. Mi rigardis la horloĝon, kiu montris preskaŭ la sepan. Mi tuj saltis, ĉar laŭ la programo mi jam devis esti preta por la maten-

formigas la komisionoj pri aeronautiko, bibliotekscienco, (bio-)kemio, informadiko (komputiko), lumigado k.a.). En junio 1985 eldoniĝis la unua modesta cirkule-ro. Laŭ peto la sekretario sendas la unuajn bazajn normproponojn pri la procedo kaj principoj de terminarfarado kaj laŭformaj aspektoj de estontaj norm-terminaroj.

Por plenumo de pli ampleksa laborprogramo necesas mono, kompetenta kunlaboro de specialistoj kaj la aŭtoritato de renomaj esperantaj institucioj.

EKSTERMOVADA, INTERNACIA NORMIGA MOVADO

Kvankam esence grava por Esperanto, la problemoj de internacia komunikado tamen ne nur koncer-nas nian Movadon.

En ISO (International Organization for Standardization), kiu de la 20-aj jaroj okupiĝas pri la objekto-normigo, oni sufiĉe frue eksciis, ke normigo de materialoj, substancoj kaj maŝinoj ne eblas sen interkompreniĝo pri la koncernaj nomoj. Tiel eldoniĝis, apud normoj pri grandoj, mezuroj kaj teknikaj de-taloj de industriaj produktoj, an-

kaŭ normoj pri terminoj de diver-saj fakoj.

Por ke tiuj terminaroj estigu laŭ unuecaj principoj, en 1936 eĉ fondiĝis speciala teknika komi-tato „TC 37“ por ellabori gvidli-niojn kaj terminologiajn principojn.

Krom ISO, en kiu nun 74 naciaj normkomitatoj kunlaboro prizor-gas preskaŭ ĉiujn (teknikajn) tere-nojn, specialaj organizaĵoj okupi-gas pri normigo en specialaj fakoj (IEC=International Electrotech-nical Commission, IUPAC=Inter-national Union of Pure and Applied Chemistry kaj aliaj).

En ŝtatoj, kie regas du- aŭ plur-lingveco, la konscio pri fakaj tra-duktproblemoj „laŭnature“ estas pli evoluinta: en USSR kaj Kanado Akademio de Sciencoj respektive universitato okupiĝas pri termini-logi-normigaj demandoj.

Grandaj industriaj entreprenoj, kiel Siemens kaj Philips, evoluigas proprajn terminologiajn datum-bankojn.

Informojn kaj dokumentojn pri ĉiuj terminologiaj aktivecoj kolektas **INFOTERM** (International Information Centre for Terimi-nology), la internacia informcent-ro por terminologio, kiun Unesko kaj la Aŭstria Norm-Instituto (ON)

en Vieno fondis 1971. Ĝia ĉefa tasko, apud dokumentado kaj infor-mado, estas kunordigado de ĉiuj pri-terminologiaj klopodoj sur nia globo.

LA PIONIROJ ESTIS ESPERANTISTOJ-ESPERANTOLOGOJ

Ĉu estas hazardo, ke gvidan ro-lon en la evoluo de tiu-ĉi interna-cia terminologi-normiga „movado“, ludis homoj, kiuj ne nur brile re-gis Esperanton, sed ankaŭ profun-de estis studentint ĝiajn strukturon kaj porterminologiajn taŭgecon? La plej elstaraj estis Eugen WÜSTER kaj Ernest DREZEN.

WÜSTER lernis Esperanton, tra-duki plurajn beletrajn verkojn kaj kompilis 8-voluman Esperanto-ger-manan „Enciklopedian Vortaron“ antaŭ ol li verkis doktorigan diser-tacion pri „Lingvovnormigo en la tekniko“. Tiu germanlingva libro, aperinta en 1931, farigis la bazo por la plua evoluo de nova scien-co, la „Generala Terminologie-Teorio“ (Allgemeine Terminologie-Lerre; General Theory of Termi-nology — GTT). Tiu libro jam en-tenas la bazajn ideojn por la pos-taj pri-terminologiaj rekomendoj de ISO (TC 37), dum kies ellabo-

mango. Hejme mi ĉiam vekigas je la sesa. Sed tie ĉi la tempo di-ferencas de la nia per kvar horoj. Krome, dum la tuta nokto pluvis, la ĉielo estis nuba kaj la tago — malserena. Mi malfermis la por-don kaj kun amikaj ridetoj min salutis la aliaj membroj de nia delegacio, kiuj min invitis al la restoracio.

Do, ĉirkaŭ la matenmanga tablo estis la kompleta delegacio de Mondpaca Esperantista Movado. (MEM). Mi alvenis tien ĉi laŭ in-vito de la vjetnamaj samideanoj okaze de la tridekjara jubileo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. La delegacio konsistis el: Clément Tholet — ĝenerala sekre-tario de MEM (Belgio), Violin Oljanov — ĉefredaktoro de revuo „Paco“ (Bulgario), Pierre Jouvin — centra kasisto de MEM (Francio), kaj d-rino Cvetana Stamenova — prezidantino de Sofia Urba Estraro de BEA.

UNUAJ KONTAKTOJ KAJ AKCEPTOJ

Je la oka horo ni estis jam antaŭ la maŭzoleo de Ho Chi Minh. Ofi-ciro nin akceptis ceremonie kaj malrapide kondukis nin antaŭen. Du soldatoj kun granda florkrono nin atendis kaj, post ili, per malra-pidaj paŝoj ni alproksimiĝis al la bazo de la majesta marmora maŭ-zoleo, kie en la nomo de nia de-legacio la soldatoj metis la flor-kronon. Poste ankaŭ ni eniris kaj

kliniĝis antaŭ la sarkofago de la granda gvidinto de la vjetnama po-polo en ĝia longa batalo kontraŭ la koloniismo kaj ekspluatado kaj poste en la konstruado de la nova vivo.

Post tio ni direktiĝis al la domo, en kiu li loĝis kaj laboris en siaj lastaj jaroj kiel prezidanto. Mo-desta ligna duetaĝa domo en bela parko kun grandaj maljunaj arboj kaj belaj floroj. Jen la teraso sur la unua etaĝo, kie li konsiliĝis kun siaj kunagantoj kaj akceptadis civitanojn. Liaj inkujo kaj plu-mingo estas sur la tablo. En la supra etaĝo estas la dormejo kaj la biblioteko. Oni proponis al li vivi pli komforte kaj lukse, sed li objektis, ke li ne rajtas vivi pli bone ol la ordinara homoj. Ni havis multajn okazojn por konvin-kigi, ke la estimplena memoro pri li estas viva ĉe ĉiu vjetnamano.

Sed la tempo progresis. Je la 9.30 h. ni devis esti en la Komitato por Paco. Nin akceptis ĝia ĝenera-la sekretario. Jam en la korto nin renkontis kunlaborantoj-esperantis-toj. Tie ĉi estis ankaŭ reprezentan-toj de la Komitato por Solidareco kun Aliaj Popoloj. La ĝenerala se-kretario prezentis la ĉeestantajn dommastrojn. Li klarigis, ke la lando estas tre malriĉa, oni devas ŝpari, pro tio ilia buĝeto estas li-migita. En tiu ĉi domo sidas 37 organizoj. Dek unu jarojn post la liberigo oni ne povas diri, ke estas jam paco. Konstante estas provo-

koj kaj minacoj. Ankaŭ internaj reakciuloj sabotas.

Grava problemoj estas la tro ra-pida kresko de la populacio: en la lando ĉiun dekan sekundon naski-ĝas infano. La agrikultura produk-tado kreskas, tamen tiu ĉi kresko ne sufiĉas por satnuri la pluslo-ĝantaron. La abunde jetitaj de la usonaj agresuloj venenaj hemiaĵoj aldone malfaciligas la situacion, la homoj suferas malsanojn, ne estas maloftaj la kazoj de nenormalaj naskiĝoj kaj disvolvigo de infanoj. La ĝenerala sekretario de la Komi-tato por Paco esprimis esperon, ke MEM povas helpi por la ĝusta in-formado pri Vjetnamio, kiu deziras pacon por restarigi sian ekono-mion, por plibonigi la vivon de la popolo. Tie ĉi mi malfermas krampojn por esprimi nian konstato-n, ke en ĉiuj institucioj, kun kiuj ni havis kontaktojn, oni paro-las kun estimo pri la Esperanto-movado, kaj laŭ siaj eblecoj ĝin helpas.

La gvidanto de la MEM-delegacio Clément Tholet prezentis ties mem-brojn kaj respondis al la salutoj. Li substrekis, ke MEM kaj ties or-gano „Paco“ ĉiam subtenis la bata-lon de la vjetnama popolo kaj an-kaŭ estonte propagandos la pacajn celojn de la Vjetnama Socialisma Respubliko kaj laŭ siaj eblecoj kaj rimedoj organizos helpon. Fine li kaj Cv. Stamenova transdonis dona-cojn, simbolatajn niajn amikajn rilatojn.

rado en internaciaj kolektivoj Wüster estis la gvida kapo. Li ankaŭ instigis kaj energie akcelis la establon de Infoterm, kies honorifica direktoro li estis ĝis sia morto en 1977.

Sed ankaŭ Ernest Karlovič DREZEN, Ĝenerala Sekretario de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), fondinto de la sovetia interlingvistiko kaj aŭtoro de multaj artikoloj kaj monografioj pri la teorio de internacia lingva komunikado kaj la historio de planlingvoj, estis samtempe rekonata specialisto pri terminologiaj demandoj. Laŭ komiso de la Sovetia Akademio de Sciencoj li kontraŭdukis en la rusan la ĉefverkon de Wüster kaj skribis raporton, sur kies bazo en 1936 ISO fondis sian pri-terminologian teknikan komitaton TC 37. De li ankaŭ originas la ideo pri internacia terminologia kodo. Tiun ideon WÜSTER dum plurjardeka okupigo evoluigis al tre ampleksa materialo, kiu nun, en la okdekaj jaroj, denove estas en aktuala diskuto.

ŜANCO POR NOVA KVALITO

La supre skizitaj faktoj en la

Esperanto-movado restis vaste nekonataj. Esperanto ĝis nun evoluis precipe dank' al la beleto kaj ne utiligis siajn skemismajn avantaĝojn por modele sistemigita fakleksiko; esperantistoj ne povis utiligi la ŝancon, envidiĝi en la internaciajn strebojn ĉi-riilate helpe de tiaj „pontaj“ eminentuloj kiel WÜSTER, DREZEN k.a. — la ekonomiaj kondiĉoj kaj la konscio pri la graveco de scienca-faka komunikado ne estis sufiĉe evoluintaj.

Sed lastatempe ie kaj tie kreskas la kompreno, ke tiel ni ne povos daŭrigi sen riski la ŝancon iam ludi seriozan rolon en ekstermovadaj sciencaj rondoj.

Necesas esenca reorganizado de la faka laboro, necesas verkado/tradukado (kaj eldonado) de altkvalitaj enkondukaĵoj en bazajn sciencojn — kaj necesas serioza okupigo pri la subevoluinta faka leksiko sur la nivelo de aktuala internacia terminologio (-scienco). Unua paŝo en la ĝustan direkton estas rezolucio kiun akceptis la Komitato de UEA dum la 70-a UK en Augsburg.

Jen la teksto:

„I. Konsiderante

— ke la scienc-teknika revolu-

cio stimulas impete la evoluon de la faka lingvo,

— ke por la estonta pozicio de Esperanto en la mondo de fundamenta graveco estas ĝia altkvalita apliko en scienco kaj tekniko,

— ke tiu faklingva apliko de Esperanto en la postulenda kvalito nur eblas, se la terminologio respondas al la necesa nivelo kaj ke diletanteco kaj hazardeco de terminologia laboro grave endanĝerigas tiun kvaliton,

II. Proponas al la Komitato, ke oni en la jaro 1987 fondu esperantan termin-normigan instituton kun la ĉefaj celoj

a) plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron,

b) reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj (ISO, Infoterm k.s.)

III. Proponas al la Komitato, ke ĝi komisiu la Terminologian Sekcion de UEA (ĝis nun ligitan al la Scienc-Eldona Centro de UEA en Budapeŝto) kunlabore kun kompetentaj esperantistaj institucioj (Akademio de Esperanto, ISAE, CED, fakaj asocioj k.s.) trovi la kompetentajn homojn, prepari la necesajn dokumentojn kaj entrepreni aliajn necesajn paŝojn por ebligi

Oni afable nin akceptis ankaŭ en la fremdlingva eldonejo, kies vic-direktoro estas ĝenerala sekretario de VPEA. Multaj ja scias, ke tiu eldonejo regule eldonas librojn en Esperanto, kiuj estas legatagaj en la tuta mondo kaj tradukataj el Esperanto en naciajn lingvojn.

Nin impresis ankaŭ la vizito al la granda Junpionira Domo de la Kulturo, kie en diversaj rondoj oni disvolvas la talentojn de la infanoj. Cv. Stamenova proponis al niaj vjetnamaj amikoj, ke oni preparu kelkajn vjetnamajn infanojn por partopreno en la esperantista grupo en la antaŭstaranta asembleo de la movado „Standardo de la Paco“ en Sofio, kion la direktoro promesis.

INTER ESPERANTISTOJ

Kompreneble, plej agrablaj momentoj por ni estis la renkontiĝoj kun esperantistoj. Tio okazis jam la duan vesperon en la E-klubejo. En la unua etaĝo ni trarigardis malgrandan ekspozicion de esperantistoj. Mi estis surprizita vidante foton de Sofiaj esperantistoj, inter kiuj ankaŭ mi kun la karmemora Nguyen Van Kinh.

En la dua etaĝo ni sidigis ĉirkaŭ tablo surŝutita per diversaj vjetnamaj raktoj. Tholet prezentis la membrojn de la delegacio kaj rakontis pri la aktivado de MEM favore al SR Vjetnamio: ofte sur la

paĝoj de revuo „Paco“ aperas materialoj de vjetnamaj esperantistoj, ĝenerale pri Vjetnamio, kaj pri ilia pacagado konkrete.

Jouvin rakontis pri amasaj elpaŝoj de francoj kontraŭ la imperiista milito.

Mi rakontis miajn rememorojn pri la neforgesebla fondinto de VPEA Nguyen Van Kinh, pri nia korespondado kaj persona renkontiĝo en Sofio.

Stamenova transdonis donacojn en sakoj kun Esperanta emblemo: gramofondiskojn, rozparfumojn k.a.

Respondante, la prezidanto Dao Anh Kha dankis al la delegacio de MEM pro la partopreno en la jubileo de la Esperanto-movado en Vjetnamio kaj pro la ĉiama helpo.

Sekvis konversacioj, tostoj, improviziaj elpaŝoj, ŝercoj. Juna knabino deklamis poemon de Dao Anh Kha. Filologino Vu Thanh Huong surprizis min per deklamo de mia versaĵo „La amiko“. La tuta vespero estis ekskluzive amika, korusa kaj neforgesebla.

La 19-an de junio 1986 okazis la jubilea kunveno de VPEA. Organizita en salono de la Komitato por Paco, ĝi estis ekskluzive modesta: sen granda prezidantaro, sen pompo, sen salutoj kaj longaj paroladoj. Dao Anh Kha faris kelkminutan enkondukon. Raporton

pri la agado de VPEA en la pasintaj 30 jaroj faris ĝia ĝenerala sekretario Nguyen Dinh Hien. Li priskribis la pozitivan rolon de la esperantistoj en la malfacila tempo de kontraŭimperiisma batalo. Post la jaro 1956 la asocio sukcesis efektiviĝi inter esperantistoj en eksterlando kolektadon de subskriboj sub peticio postulanta striktan aplikadon de la Ĝenevaj Interkonsentoj pri Vjetnamio kaj Hindoĉinio. Kiam Usono entreprenis agresan eksterman militon en Suda Vjetnamio kaj transportis ĝin al socialisma Vjetnamio, la esperantistoj akirigis al si per MEM kaj diverslandaj Esperanto-organizaĵoj simpatian kaj subtenon. La raportanto evidentigis la rolon de la abunda Esperanto-eldonado. Li substrekis, ke VPEA kiel tuto aliĝis al MEM. La 200 ĉeestantoj varme aplaudis la raporton.

La jubileulojn salutis ankaŭ Clément Tholet kaj Cvetana Stamenova. Fine oni projekciis vjetnaman filmon.

AL URBO HOŜIMINO

La aviadilo descendis kaj ni vidis la belajn kaj altajn domojn de urbo Hoŝimino. Veturante al la hotelo, ni vidis la konatan bildon de amaso da biciklistoj kaj la sama abundo da infanoj. Ili plengas trotuarojn, placojn, ĝardenojn. La varmo estis 32°C, tamen tie ĉi oni pli facile spiras, eble la aĝro ne estas tiel humida. Sed la

gi la fondon de tiu Esperanta termin-normiga instituto

IV. Proponas establi la „Fondaĵon Wüster“ (fondaĵo terminologio) por certigi la necesajn financajn rimedojn por terminologiaj aktivecoj

ĈIUJ POVAS KONTRIBUI

Surbaze de tiu rezolucio eblas la konstruado de pli solida, pli efika institucio ol povis ĝis nun rezulti el la klopodoj de bonvolaj unuopuloj. Sed la sukceso dependos de la preteco de ĉiuj kapablaj esperantistoj, doni sian specifan kontribuon por afero, kiu koncernas nin ĉiujn. Jen kelkaj ekzemploj, kiel eblas subteni la terminologi-normigan laboron:

1. organize-informe:

internacia (mondvasta) kunlaboro bezonas homojn, kiuj kapablas ĝin amplekse organizi. Ili devas akiradi kaj pludonadi ĝisdatajn sciojn pri terminologiaj teorio kaj praktiko (lernado kaj instruado), peri kontaktojn inter movadaj kaj ekstermovadaj instancoj, instigi esperantistojn-fakulojn al terminografia laboro kaj helpi/

konsili al ili en organizaj demandoj;

2. Terminografie:

La plej granda grupo da kunlaborantoj estos la fakuloj, kiuj konkrete prilaboros la terminarojn de siaj fakoj. Ili bezonas kaj super-rigardan, kaj profundan scion pri sia fako, ĝeneralan kleron kaj bonan konon de lingvoj (ne nur la gepatra kaj Esperanto, sed laŭeble ankaŭ aliaj); cetere tiu-ĉi tasko postulas precizecon, paciencon kaj kunlaborem;

3. Finance:

Ĉar terminologia agado estas science fundamenta kaj la eldonado de (norm-) fakvortaroj — pro la relative malgranda uzantaro — ne povas esti enspeza, finance memstara entrepreno, la esperantistaro devos zorgi por la necesaj rimedoj. Kvankam la laboro de terminografoj (vd. 2) kaj de organizantoj (1) ne estos pagata, tamen estas neeviteblaj diversaj elspezoj. Mondonacoj de ĉiuj altecoj do estos bonvenaj.

4. Aplike:

programo ankaŭ tie ĉi estis streĉita. Ni loĝis en bela, komforta, preskaŭ luksa hotelo, tamen ni ne havis tempon por ripozi. Tuj oni nin kondukis al la unua akcepto ĉe la Komitato por Paco. La ceremonio ripetigis, kiel en Hanoj. Ni eksciis interesajn detalojn pri la bataloj por liberigo de la lando.

Interesa estis la akcepto en la magistrato kaj la interparolo kun la vicurbestro. Ĉiam ankoraŭ vastan rolon tie ludas la privata iniciativo en industrio kaj komerco. Ĉiu rajtas malfermi kaj gvidi entreprenon kun ne pli ol 10 laboristoj. Ekde 1975 oni klopodas plibonigi la ekonomian situacion. Nur post du jaroj la tuta industrio eklaboris normale. De 1980 ĝis 1985 la industria produktado kreskis per 20%. Nun en la regiono estas konstruataj du grandaj elektrocentraloj. Al 1990, kiam la centraloj ekfunkcios, la energia problemo estos solvita.

En nia programo estis antaŭvidita ankaŭ vizito en „lakta“ fabriko. Ni pensis, ke ni vidos produktadon de fromaĝoj. Tamen temis pri tute alia objekto: fabriko por artaj metioj. Oni uzas plantan lakton pentrante la bildojn sur lignaj vazoj, skatoloj kaj aliaj produktaĵoj. La produktaĵojn de la fabriko oni eksportas en multajn landojn. La laboristoj estas 120, 40% el kiuj — virinoj. La averaĝa salajro estas 1000 dongoj — sufiĉe alta por la kondiĉoj de Vjetnamo. La salajro de fabrikaj oficistoj estas 5000 dongoj.

Por likvido de la plaĝaj postsekvoj de la koloniisma reĝimo,

en 1975 estas fondita Centro por Edukado de la Nova Junularo. Tio estas instituto por kuracado kaj revenigo al normala laborvivo de narkotomaniuloj.

La ginekologia malsanulejo kun 750 litoj estis la lasta objekto, kiun ni vizitis. Ĝi estis plena. Konsiderinda nombro da malnormalaj naskoj pro la postsekvoj de la jetitaj far la usonanoj venenaj ĥemiaĵoj komplikas la laboron de la kuracistoj kaj de la cetera personaro. Estas interese, ke en tiu malsanulejo inter la aliaj estas ankaŭ fako por familia planado. Tie estas registrataj tiuj familioj, kiuj pretas plenumi la kuracistajn konsilojn pri limigo de la naskoj, kaj ili ricevas materialajn stimulojn de la ŝtato.

Ankaŭ en Hoŝimino plej interesa kaj kortuŝa por ni estis la renkontigo kun esperantistoj. Ĉeestis 25 samideanoj, inter ili veteranoj, eksprezidanto de VPEA, nunaj membroj de ties komitato, ĝia vicprezidanto, ankaŭ du kampuciianoj. Estis intersanĝitaj donacoj. Du infanoj plenumis programon. Post la recipi okazis salutaj efektivigis amika konversacio. Mi invitis la ĉeestantojn kunlabori al „Paco“. La lastan tagon en la hotelo ankaŭ okazis konversacio kun parto da ili. La junuloj montris grandan intereson al la E-movado en Bulgario.

LASTAJ TAGOJ EN HANOJO. ĜIS REVIDO, VJETNAMAJ FRATOJ!

La sekvajn tagojn post la reveno en Hanojon ni renkontigis kun la

Ne laste necesas, ke 17 estontaj normoj estos konataj, disvastigataj kaj aplikataj. Neniu ŝtata aŭ jura potenco povas devigi la homojn, ke ili uzu tiun ĉi esperantan terminon kaj ne alian. Pro tio gravas tut-movada kompreno por ke fakuloj, (speciale aŭtoroj kaj redaktistoj) utiligu la terminarojn kaj apliku la normigitajn terminojn.

Jen nur kelkaj el la eblecoj por partopreni en la komuna plenumado de grava tasko. Se inter la menciitaj punktoj estas io por vi aŭ se vi havas aliajn ideojn por perfektigi la supran skizon — skribu al:

Ivan Bujdos, sekretario de TeS
TeS de UEA

H-1368 Budapest, Pf. 193
aŭ al:

Wera Dehler, estraro de TeS,
GDR-1141 Berlin, Otto-Nagel-Str
110 Pf. 113-05

Por faciligi nian laboron, bonvolu laŭeble aldoni kopion de via letero!


El „Der Esperantist“ — 1/86

prezidanto de la Komitato por Paco, kiu estas samtempe vicprezidanto de la Nacia Asembleo (parlamento). Post la kutimaj prezentoj kaj salutaj ĉeftemo de nia konversacio denove estis la peza ekonomia situacio.

La 25-an de junio la okcident-eŭropa parto de la delegacio de MEM forveturis. Sed antaŭ tio ni estis invititaj en la televido, kie oni intervjuis nin. La filmo estis bone farita kaj certe havos efikon sur la vjetnaman sacion. Kvankam lacaj pro la nekutima klimato kaj streĉa programo, kiun ni plenumis en daŭro de 9 tagoj, ni tamen ek-sentis malĝojon pro la alproksimiganta disiĝo. En la lasta tago de nia restado oni montris al ni novajn kvartalojn kun modernaj konstruaĵoj, belajn magazenojn kaj hotelojn.

Venis la lastaj minutoj, dum kiuj kun ni estis kelkaj vjetnamaj esperantistoj. Frataj ĉirkaŭprenoj kaj bondeziroj pri novaj renkontigoj. Ĝis revido, karaj vjetnamaj fratoj! Dankon pro la amika akcepto, pro la belegaj 9 tagoj en via malproksima lando. Apartan dankon al la prezidanto de VPEA Dao Anh Kha — la motoro de la movado, al la sekretario Dang Dinh Dam — nia konstanta akompananto kaj tradukanto, al mia filologa kolemino Vu Thanh Huong, kiu same nin akompanis kaj tradukis, al niaj gastigantoj en la komitatoj por paco en Hanoj kaj Hoŝimino. Sincera dankon kaj amikajn salutojn al ĉiuj!

Hanojo-Sofio, julio, 1986



DOKUMENTOJ PRI MALEBLIGO DE KATASTROFO . . .

Mihail Gorbačov: „Politika Raporto de Centra Komitato de KPSU al la 27-a Kongreso de Komunista Partio de Soveta Unio. Konkluda Parolado de la Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU M. S. Gorbačov en la 27-a Kongreso de KPSU. Rezolucio de la 27-a Kongreso de Komunista Partio de Soveta Unio pri la Politika Raporto de Centra Komitato de KPSU. 19,3×12,4 cm, p. 150. Eldonejo de Presagentejo „Novosti“ (APN), Moskvo, 1986. Tradukis L. Novikova k. a., redaktis D. Perevalov k. a.

Kiam mi vidis tiun libron por unua fojo, antaŭ mi aperis laŭ asociado la libro „Dokumentoj de Komunismo“, 1923, p. 129. Kaj post ĝi vicigis pluraj dekoj da libroj, modestaj laŭ amplekso kaj eksteraĵo, sed arde pledantaj por defendo de la unua en la mondo ŝtato de Laboristoj kaj Kamparanoj kaj kontraŭ la preparoj por la Dua Mondmilito. Tiuj Dokumentoj kaj broŝuretoj estis eldonitaj de organizitaj laboristaj esperantistoj. Ili trovis bonan akcepton ankaŭ inter aliaj demokratiaj esperantistoj kaj ofte estis pozitive recenzataj eĉ en uj neŭtralaj Esperanto-organoj.

Post la Dua Mondmilito, ekde la fino de la 50-aj jaroj, en Soveta Unio oni iniciatis eldonon de libroserio „Por la Paco“, de kiu aperis preskaŭ 20 libroj, eldonitaj de SSOD. Post la solena celebrego de 65-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio oni fondis specialan eldonon de libro-serio kun dokumentoj de USSR kaj KPSU. En la manoj de esperantistaj legantoj jam estas la plej freŝa kaj impona dokumento — la nun recenzata libro.

En tiuj tri dokumentoj de la 27-a Kongreso de KPSU oni traktas en vasta skalo la brulantajn problemojn de nia epoko kaj montras la racian solvon, kun egala sekureco por ĉiuj. La antagonismo inter la du mondaj sistemoj, formacioj (kapitalismo kaj socialismo) estas granda, tamen la homaro loĝas en unu korto — sur la surfaco de nia malgranda planedo — la Tero. Kernaj, kemiaj kaj biologiaj armiloj nun kapablas neniigi por ĉiam ne nur la homaron, sed ankaŭ la tutan vivon (la

flaŭron kaj la faŭnon). La nunaj pretendoj pri regado super la tuta mondo estas iluzio. La paco — ne la milito — estas la saĝa alternativo. Paca kolektiva kunlaborado, sed ne kolektiva pereol!

Ĉiu homo, ĉiu nacio, la tuta homaro estas minacata per iom-post-ioma ekstermo pro malpurigo de nia Patrino — la Naturo. Oni povas preventi tiun novan katastrofon nur per kolektivaj klopodoj. „La acidaj pluvoj“ kaj la venenaj gasarestaĵoj de kemiaj uzinoj atakas la vivon sur la tero. Kemiaj rubolikvaĵoj pereigas la vivon en riveroj, lagoj, maroj, oceanoj. Jen solvenda tasko por la tuta homaro.

La averioj en kemiaj kaj biologiaj fabrikoj, en atomcentraloj estas tria grava mortminaco kontraŭ la tuta homaro. Denove estas necesaj la kolektivaj fortoj de la tuta homaro por fabrikado de sekuraj teknikaj maŝinsistemoj kaj la kolektivaj fortoj de ambaŭ formacioj estas necesaj por rapida interhelpo sur la loko de averio.

En la recenzataj tri dokumentoj de KPSS oni indikas la minacojn, ekstermontajn la vivon sur la Tero kaj apelacias al racio kaj bonvolemo kaj ĉe registaroj kaj ĉe la ordinara pololanoj organizite kontraŭstari la preparatan militon, protekti la Naturon — nian vivmedion, kolektive fabriki sekurajn maŝinsistemojn kaj esti preta pri interhelpo en okazo de averio kun internacia amplekso.

Tiu libro estas kvazaŭ enciklopedio por la nuntempa pacdefendanto kaj humanisto. Legu ĝin, studu ĝin, vastigu ĝin!

POR PACO, KONTRAŬ LA MILITO

Nikola Aleksiev: „Mia Porpaca Agado“ redaktis Nano Kjuĉukov, 20×14,4 cm, p. 93, eld. Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1986.

Tiu verko de Nikola Aleksiev estas resuma kolekto. Ĝi enhavas parton de liaj plej belaj verkoj de esperantisto batalanta por paco, por bono kaj belo. La ĉefverko de tiu libro estas ampleksa studo pri la pacdefendo far Georgo Dimitrov kaj kontraŭ la militpreparoj antaŭ la Dua Mondmilito. Krom tio la aŭtoro vaste traktas la favoran rilaton de Georgi Dimitrov al la Esperanto-movado, precipe post la Dua Mondmilito. La represo de tiu ĉefverko en la nuna kolekto estas tre necesa ĉar en 1982 ĝi estis presita en malgranda eldonkvanto. La nuna eldono estas destinita plejparte por eksterlando, lige kun la Jaro de Paco.

En la sekvaj tri artikoloj la leganto ĝuos informojn pri la aktiva partopreno de L. L. Zamenhof en la batalo por paco kaj humanismo (p. 64–67), ekkonos la ĝeneralajn principojn kaj la specifajn tezojn de Mondpaca Esperantista Movado (p. 68–72) kaj la batalvojon d

Antoni Balague, iniciatinto de organizita pac-defendo en formo de MEM (p. 73—81).

Fine sekvas du artikoloj pri persekutoj fare de la bulgaraj faŝistoj kontraŭ Bulgara Laborista Esperanto-Asocio en 1930—1934 (p. 82—85) kaj kontraŭ ties sekretario Nikola Sopov, 1912—1941 (p. 86—89). Tiuj artikoloj kvazaŭ liveras detalojn kaj nuancojn al la antaŭaj kvar verkoj.

Tiuj ses porpacaj studoj kaj artikoloj pri movadoj kaj personoj batalantaj kontraŭ la milito kaj por paco estas kvazaŭ krampitaj de Aŭtobiografio (p. 10—30) kaj Bibliografio pri verkoj originalaj, tradukaj aŭ redaktitaj de la aŭtoro (p. 90—93). Tie ne estas menciita la bulgarlingva kolekto „Esperanto en Servo de la Patrio“. En ĝi Nikola Aleksiev kontribuis per tri studoj (p. 39—49, p. 80—88, p. 89—92).

La Aŭtobiografio estas inter la plej interesaj legaĵoj. El ordigitaj faktoj kaj ilua rakonto (21 paĝojn) oni ekscias multon pri la vivo, verkaro, organiza kaj redakta laboro de Nikola Aleksiev — elstara pacaganto, honora prezidanto de MEM (Mondpaca Esperantista Movado).

Post tri monatoj finiĝos 1986 — la Jaro de Paco. Eble estos bone, se la Internacia Komitato de MEM farus proponon al la Internacia Pac-Komitato pri proklamo de „Jardeko de la Paco“ (1986—1996).

Al intensa agado por savo de la homaro el la konkreta militminaco!

Canko MURGIN

KOOPERATIVA E-ARANGO

En urbo Gyula (Hungario) dum la tagoj de la Somera Esperanto-Universitato okazis la laŭvica Kooperativa Esperantista Konferenco. Partoprenis reprezentantoj el Anglio, Bulgario (3-membra delegitaro), Pollando kaj Hungario. En amika etoso oni pridiskutis aktualajn profesiajn problemojn en diversaj sferoj de la kooperativa aktivado. La estraro de la konferenco — d-ro Jozsef Pál, prezidanto de Kooperativa Esperanto-Komisiono, Dimităr Mutuŝev, ĝenerala sekretario de Kooperativa Esperantista-Sekcio kaj Imré Szabo, sekretario de KEK, lerte gvidis la diskutojn. La ĉefan raporton faris d-ro J. Pál (Hungario), kiu tuŝis bazajn demandojn de la kooperativaj kaj la nunajn taskojn de la kooperativanoj-esperantistoj. Li emfazis, ke kreskas la respondeco de la hungaraj kooperativanoj lige kun la antaŭstarantaj kongresoj de industriaj kooperativoj en oktobro, de konsumkooperativoj — en novembro kaj de agraraj kooperativoj — en decembro.

En sia parolado D. Mutuŝev (Bulgario) prezentis la materialon „Centra Kooperativa Unuiĝo“ antaŭ sia deka jubilea kongreso. La bulgaraj kooperativanoj partoprenos sian kongreson kun forta memfido, ĉar dum la Oka kvinjara ekonomia plano (1981—1985) ili atingis bonajn rezultojn. Tio estis jaroj de fruktdona evoluo kaj inda kontribuo de la kooperativa sistemo al konstruado de la nova vivo en Bulgario.

Julia Delčeva el la scienc-esplora centro „Koopprogres“ ĉe Centra Kooperativa Unuiĝo (Bulgario) parolis pri la sukcesoj de la bulgara kooperativa movado. Temas pri scienca verko prilumiganta la kialojn de la atingitaj bonaj rezultoj.

Kalinka Vasileva atentigas pri la praktika laboro de

„Koopprogres“ per Esperanto. Ĝi jam havas senperajn kontaktojn kun iuj esperantistoj kaj kelkaj sciencaj institutoj. La komenco montras la pravecon de la elektita vojo. Tiu agado daŭros ankaŭ estonte, ĉar la estro de la Centro, prof. N. Vălev, alte taksas la eblecojn de Esperanto en la scienco pri kooperativa agado. Dum la 72-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto (Varsovio 1987) estos fondita Internacia Kooperativa Esperantista Organizaĵo.

D. MUTUŜEV

KONFERENCO DE KEK

En la aŭstria urbo Vordernberg okazis grava konferenco de Komunista Esperanto-Kolektivo (KEK). Tio estis la tria postmilita konferenco de la eŭropaj marksistaj-leninistaj komunistoj-esperantistoj.

La konferenco okazis la 20—26. 6. 86. Ĝin partoprenis pli ol 30 delegitoj el FRG, Svislando, Aŭstrio, Hungario, Italio kaj ses bulgaroj.

La konferenco okupiĝis pri tri fundamentaj demandoj celantaj plibonigon de la estonta laboro. La unua punkto estis ellaboro kaj akcepto de statuto de la organizo, laŭ kiu oni devas akcepti KEK en UEA, kiel neneŭtralan organizon, kaj elekti estraron de KEK.

K-do Schick, la redaktoro de la organo de KEK „Internaciisto“, tralegis la projekton de la statuto, kiun la delegitoj, punkton post punkto, post seriozaj pridiskutoj, akceptis unuanime. Poste la konferenco elektis novan estraron de KEK. La dua punkto estis: plibonigi la enhavon kaj plibeligi la eksterajn de „Internaciisto“. Oni emfazis, ke multaj Esperanto-Asocioj ne bone komprenas la celojn kaj la batalon de KEK.

Unu post la alia prenis la parolon kamaradoj: Schwrz el FRG, Karlo Vinolodi el Svislando, Heiderer kaj Schick el Aŭstrio, Imré Horvat el Hungario, Garev kaj Grozdanov el Bulgario. Ili ĉiuj substrekiis, ke la tuta agado de KEK baziĝas sur la principoj de marksismo-leninismo.

La tria punkto de la konferenca tagordo estis dediĉita al la batalo kontraŭ ĉiuj antisovetiaj kaj antisocialismaj skribadoj.

Oni konstatis, ke lastatempe ariĝas la reakciaj gazetoj kaj aliaj, laŭ la modelo de „Horizonto“ de s-ro Lapaena, „Sennaciulo“ de SAT k.a., kiuj konstante kaj senĉese atakas, kalumnias kaj klaĉas kontraŭ Sovetunio kaj la socialismaj landoj.

La konferenco unuanime decidis, ke KEK devas pli intime kunlabori kun MEM. KEK batalas por paco same kiel MEM, sed KEK estas pure klasbatala organizo.

Laŭ la programo, la delegitoj vizitis partizanan terkabanon, la tombejon de la ruĝarmeanoj en Leoben kaj la sovetan monumenton en Vieno.

La tria konferenco de KEK sukcesplene finis sian laboron.

Ljuben GROZDANOV

GRATULOJN AL PROF. PEEVSKI

Dum la XVIII Internacia Kongreso de Geodezistoj, okazinta fine de junio j. k. en urbo Toronto, Kanado, kiel honora prezidanto de la Internacio de Geodezistoj estis elektita prof. d-ro ing. Vasil Peevski (Bulgario).

Vasil Peevski estas distingita per honoraj titoloj Heroo de la Socialisma Laboro kaj Popola Aganto de la Tekniko. Krome prof. Peevski, kiel konate, estas aktiva esperantisto. En la momento li estas prezidanto de la E-sekcio de la Unuiĝo de Scienclaboruloj en Bulgario kaj redaktoro de la E-versio de revuo „Scienca Mondo“.

„BE“

NOVA FORMO DE ORGANIZA LABORO

Nelonge post la 41-a Nacia Kongreso de BEA kaj la 13-a Kongreso de BKP oni jam sentas la influon de iliaj decidoj pri novaj formoj de laboro, celantaj pli efikajn rezultojn en ĉiuj sferoj de nia vivo.

CE de BEA enkondukas novan formon de instruado kaj intersaĝo de sperto inter E-gvidantoj. Temas pri la regionaj seminarioj por E-gvidantoj okazintaj en Stara Zagora, Varna, Sofio kaj Pleven. La celo de tiuj seminarioj estas ne nur pridiskuti la diversajn prezentitajn prelegojn, sed ankaŭ ke la homoj el la koncerna regiono renkontiĝu, konatiĝu kaj realigu personajn kontaktojn. La programo por ĉiuj seminarioj estas proponita de CE de BEA. Jen la prelegtemoj: Organiza strukturo de BEA; Laboro kun la E-kadruloj kaj kunlaborado kun la amasaj organizoj; Ordigo de la dokumentaro, korespondadoj kaj arĥivo de DE kaj de la societaj estraroj; Planado de la E-agado; Organizo de la instrulaboro; Sekcioj de BEA; Ekonomia agado de la E-organizoj; Propagandado de la internacia lingvo Esperanto.

La pliparto de prelegantoj estas reprezentantoj de CE de BEA, kutime ĉiu el ili prelegas pri problemoj, pri kiuj li (aŭ ŝi) respondacas en CE. Ekz. pri organizaj problemoj — Vasil Vutov; pri instrulaboro — Angel Todorov; sekcia laboro — Petar Todorov; ekonomia agado — Dimitar Mutusev, J. Koev. Pri temoj kiel „Propagandado de la internacia lingvo Esperanto en la distriktoj“ en Stara Zagora prelegis Hristo Gelebov, en Sofio — Ivan Peev, en Pleven — Dončo Hitrov, kaj pri „Ordigo de dokumentaro...“ — D. Hitrov, Ivan Peev, P. Gospodinov, D. Kamenopolski k. a. La temoj estas variaj kaj ampleksas diversajn flankojn de nia laboro.

Ĉiuj seminarioj okazis en majo-junio ĉi-jare (Stara Zagora — 10-11.05., Varna — 10-11.05, Sofio — 31.05.-01.06., Pleven — 14-15.06).

Kvankam la programo estis la sama por ĉiuj, la seminarioj diferencis laŭ la nombro kaj konsisto de partoprenantoj. En Stara Zagora ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj el Stara Zagora, Ĥaskovo, Plovdiv, Pazargic, Jambol, Burgas — prezidantoj kaj sekretarioj de societaj estraroj. Bedaŭrinde, kiel jam ne unufoje okazis, denove mankis reprezentantoj de Kärĝali.

Dum la sama tempo en Varna kolektiĝis 86 personoj el Varna, Razgrad, Sumen, Silistra, Targovište. Tie denove mankis reprezentantoj de unu distrikto, ĉi-foje de Tolbuhin. Kial do? ... Dum tiu seminario la partoprenantoj preparis oficialan leteron-proponon al CE de BEA, kiun ni citos:

„Ni trovas tiun formon de instruado kaj de intersaĝo de opinioj kaj sperto ĝustatempe, celkonforma kaj utila.

Ni proponas, ke CE de BEA subtenu ĝian daŭrigon kaj, se necese, organizu ĝin eĉ dufoje ĉiujare.

Honore al la jubilea jaro la partoprenantoj promesas energie klopodi por varbado de novaj membroj kaj aktive partopreni en ĉiuj aranĝoj de BEA“.

La 31-an de majo kaj la 1-an de junio en la ĉefurbo Sofio renkontiĝis estraranoj de la societoj en Sofio — urbo kaj distrikto, Kjustendil, Blagoevgrad, Pernik — entute 42 personoj.

La laste okazintan seminarion, en Pleven, partoprenis ĉirkaŭ 70 personoj el Pleven, Vidin, Mihajlovgrad, Vraca, Loveĉ, Veliko Tärnovo. Dum la viglaj diskutoj la partoprenintoj esprimis siajn opiniojn, ideojn, sperton en la E-aktivo. Oni faris proponojn pri eldono de propagandaj materialoj pri Esperanto antaŭ la 100-jara jubileo, emfazis la mankon de E-literaturo — precipe por infanoj, de lernolibroj, instruhelpiloj. Oni ankaŭ esprimis la opinion, ke en ĉiu distrikto oni bezonas almenaŭ unu salajritan esperantiston, kiu ĉiutage laboru kaj zorgu pri la E-agado.

La konkludo estas pozitiva: tiuj seminarioj estis organizitaj ĝustatempe kaj estis tre utilaj. La iniciato de CE de BEA kaj de ĝia organiza fako estas gratulinda kaj ni esperu, ke ĝi daŭre evoluos kaj perfektigos!

Mariana ELENOVA

LAŬ LA VOJO DE KUNLABORADO

Dum la lastaj jaroj la E-movado en nia distrikto iom post iom kunfandiĝis kun ĝia socia kaj kultura vivo. Tio ja estis unu el la ĉefdirektoj, kiujn la 41-a Kongreso de BEA starigis antaŭ la distriktaj estraroj. Jen pro kio antaŭ DE de BEA en Razgrad tute nature aperis la demando pri kunlaboro kun la distrikta kaj komunuma komitatoj de Patrolanda Fronto, kun Bulgara Sindikatoj, Bulgara Asocio pri Turismo, la Distrikta Konsilantaro de la Bulgara Asocio pri Korpokulturo kaj Sporto, Distrikta Asocio pri Turismo kaj Ripozo, Distrikta Komitato de la Movado de Bulgara Virinoj.

La intimaj ligoj kun la ĉi-supre menciitaj amasaj organizoj multe helpas la bonan kaj ĝusteteman organizadon kaj okazigon de la E-kursoj kaj la fondon de grupoj kaj societoj de DE de BEA. Granda estas la kontribuo de la amasorganizoj ankaŭ ĉe realigo de la kulturceloj kaj taskoj, starantaj antaŭ BEA.

Karakteriza trajto de tiu kunlaborado estas la abundeco de iniciatoj: renkontiĝo-dialogo kun junaj reprezentantoj de la krea intelektularo en Razgrad, serio de lekcioj kaj radio-elsendoj — pri la loko de floro en nia hejmo, pri la japana arto aranĝi florojn „Ikebana“, pri tio kiel aranĝi la festan manĝotablon. ktp.

La fono de la grupoj „Virinoj-esperantistinoj“ kaj „Turistoj-esperantistoj“ okazis kunlaboro kun la Distrikta Komitato de la Movado de Bulgara Virinoj kaj la Distrikta Konsilantaro de Bulgara Asocio pri Turismo.

Dum la preparo de la XIX Nacia Ravuo de E-Parelo kaj Kanto la helpo kaj kunlaboro de tiuj organizoj estis ankoraŭ pli aktivaj.

Siaflanke la esperantistoj en la distrikto aktive partoprenas la kultur-klerigan agadon de la amasorganizoj. Ili estas oftaj gastoj al la aranĝoj de tiuj organizoj: vesperoj, tradiciaj renkontiĝoj, lekcioj, konkursoj, ekspozicioj, turistaj marŝoj.

Tiu intima kunlaboro pliriĉigas la sperton de la esperantistoj, proponas al ili pli vastajn eblecojn por realigado de la komuna granda ideo pri estetika edukado de la laboruloj.

D-ro Ivan KIRCEV,
prezidanto de DE de BEA

SCIENCA KONFERENCO EN BANKJA

La 20-an kaj 21-an de junio k. j. en urbo Bankja la Medicina E-Sekcio de BEA kaj la sciencaj societoj, kiuj okupiĝas pri kuraclokoj, fizioterapio kaj resanigado, pri medicina geografio, psikiatrio, nutrado kaj dietistiko, pri sporta medicino kaj kuraca korpokulturo, organizis scienc-praktikan konferencon pri fizioprofilaktiko kaj konforma al la higienaj reguloj vivmaniero.

Dum tri plenkunsidoj estis prezentitaj 17 prelegoj kaj sciencaj anoncoj, el kiuj 8 — en Esperanto.

La kvara plenkunsido estis dediĉita al la priagada raporto kaj planoj de la Medicina E-Sekcio. Raportis la prezidanto de la sekcio prof. d-ro Kiril Popov.

La okazinta scienc-praktika konferenco distingiĝas antaŭ ĉio per la aktualeco de la traktitaj problemoj — nome la psika kaj fizika sano de la homoj en la lumo

de la decidoj de la XIII partia kongreso kaj la Nacia Programo pri Sanprotektado.

Estis pridiskutitaj interesaj problemoj, ekz. vivmaniero konforma al la higienaj reguloj kaj sciencoteknika revolucio, nutrado kaj sano, movreĝimo kaj sano, pacbatalo kaj sano.

La pli interesaj titoloj de raportoj en Esperanto estis: Sanedukado kaj konforma al la higienaj reguloj vivmaniero (d-rino M. Lukanova), Fontoj de la sano (prof. Kiril Popov), La psika defendo — grava medicina problem (d-ro K. Mečkov), Metodoj por memgardado de la sano (d-ro N. Donev), Popolaj manieroj de kuracado (d-rino V. Bukovinova).

Al la valoro de la konferenco aparte kontribuis la partopreno de la eminentaj bulgaraj specialistoj en la sfero de medicino — profesoroj Balabanski, Zaimov, Bojagiev, Kostadinov k.a. Iliaj starpunktoj dum la diskutoj ĉe la ronda tablo provokis vigan intereson.

D-rino Mariana DIMOVA, Varna

SOCIETA AKTIVADO

Antaŭ 2 jaroj en urbo Senovo, distrikto de Razgrad, estis organizita kurso, en kiu kelkaj gejunuloj kaj gelnantoj komencis lerni Esperanton. Baldaŭ estis fondita nia E-societo „Supreniro“. En la komenco ĝi havis nur 20 membrojn, sed ilia nombro iom post iom multigas.

Dum la XIX Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Razgrad nia societo partoprenis individue kaj grupe. Tre bone sin prezentis Stoil Vasilev kaj Temenujka Todorova en la fablo „Grilo kaj formiko“, kiuj gajnis III premion.

Bosilka VELEVA

NIA AGADO

La urba societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en Razgrad havas 125 membrojn. Dum la lastaj jaroj la societa agado aktivigis, precipe post la ekfunkcio de nia Esperanta Kulturdomo.

La renkontiĝoj kun esperantistoj, vizitintaj diversajn landojn, ekz. Nikolaj Uzunov el la Bulgara E-teatro, Neli Abagieva, D. Popova k. a. plifortigas la intereson al Esperanto, al la E-movado.

La membroj de societo „L. L. Zamenhof“ aktive partoprenas ĉiujn arangojn, organizitajn kune kun nia Esperanta Kulturdomo: amuzvesperoj, festado de naskiĝtagoj, sedjankoj, renkontiĝoj kun kulturagantoj, piedmarŝoj, ekskursoj k. a.

Estas jam tradicio la novjaraj baloj, kie la junularo interparolas, interkonatiĝas kaj plej grave — amuziĝas.

Interesaj kaj emociaj estis la renkontiĝoj kun esperantistoj el GDR, Francio k. a.

Nia societo subtenas kontaktojn kun esperantistoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Pollando k. a., kaj ankaŭ kun E-societoj en la lando — Sumen, V. Târnovo, Lovec, Silistra.

En 1984 ĉe nia societo estis fonditaj junpioniraj grupoj al la Klubo de Internacia Amikeco en lernejo „Hr. Botev“ kaj en lernejo „V. Kolarov“, respektive nomitaj „Verda Steleto“ kaj „Paco“. Ili plenumas interesan kaj varian laboron: oni gvidas kursojn pri lernado de la lingvo, preparas literaturajn programojn, prezentotajn antaŭ kunvenoj, lernejaj festoj.

Ci-jare aktivigis la plej junaj esperantistoj precipe lige kun ilia partopreno en la XIX Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto, okazinta en Razgrad.

Fine de la lernejaraj pri la agado de la infanaj grupoj oni raportas al la estraro de nia societo „D-ro L. L. Zamenhof“ kaj al reprezentantoj de DE de BEA. La plej aktivajn junajn esperantistojn oni premias.

La lernado de Esperanto en niaj kursoj, la membreco en nia societo kaj la aktiva partopreno en ĝiaj arangoj helpas al niaj esperantistoj ankoraŭ pli forte eka-

mi la bulgaran literaturon, tradukitan en Esperanto, ĉion bulgaran, kion niaj geamikoj-esperantistoj el eksterlando alte taksas. Dank' al Esperanto ili kreas ligojn kun geamikoj el la tuta mondo. Por ili Esperanto fakte estas fenestro vaste malfermita al la mondo.

Varia kaj enhavoriĉa estas nia agado, sed la 100-jara jubileo de Esperanto, la decidoj de la 41-a Kongreso de BEA kaj de la 13-a Kongreso de BKP devigas nin disvolvi ankoraŭ pri seriozan agadon, por ke la kvalito estigu la plej grava kriterio en la kompleta societa agado, aktive partopreni en la batalo por defendo de la paco sur la Balkanoj kaj en la tuta mondo, por stabiligi, plivastigi kaj pliprofundi de la ligoj inter esperantistoj el la tuta mondo.

¹Sedjanka — vespera amuzlaborado.

Radka STOJANOVA,
prezidentino de societo
„D-ro L. L. Zamenhof“

SUKCESA FINO DE LA LERNOJARO

Finigis la lernejaroj 1985/86. La gelnantoj el la eksperimenta grupo en 8-a klaso de VIII Meza Politeknika Lernejo en Sofio diligente lernis Esperanton kaj atingis bonegan rezultojn. El ĉiuj 35 personoj en la klaso ekzamenigis 33 kun bona rezulto perfekta (5,65). La 16-an de junio j. k. en la junulara klubejo ĉe la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco estis organizita solenaĵo por ĉiuj gelnantoj el VIII Meza Politeknika Lernejo, kiuj lernis la Internacian Lingvon. Tie ili ricevis siajn atestilojn por unua grado. La ceremonion inaŭguris Marin Băcev — ĉefmetodikisto ĉe CE de BEA. Per sinceraj vortoj li turnis sin al la juna esperantista generacio kaj bondeziris al ili sukcesojn en la plua lernado de Esperanto. Salutarolon en Esperanto faris la docento ĉe la Estona Universitato en Tallin — Vjaĉeslav Hromov. Al la instruistino Ivanka Spasova li enmanigis donacon el Estonio — pupo en nacia kostumo. Post la disdono de la atestiloj en la nomo de UE de BEA salutarolis ĝia vicprezidanto Hajm Levi. Dividante siajn impresojn antaŭ la reprezentantoj de UE s-ro Hromov deklaris, ke li estas tre kontenta pri sia interparolo kun kelkaj gelnantoj — ili bone komprenis ĉiujn demandojn kaj scipovis trafe respondi.

Ljubka MANDALOVA

JUNULARA RENKONTIGO

Laŭ iniciato de E-societo „Verda Eskadrono“ — Târgoviște, la 17-an—18-an de majo 1986 okazis en la montodomo „Mladost“ (Juneco) junulara renkontiĝo. Partoprenis geesperantistoj el Târgoviște, el Veliko Târnovo, kaj apartaj esperantistoj el Razgrad kaj Sofio.

La renkontiĝo koincidis kun la festo de Târgoviște, kies stratoj kaj placoj estis bunte ornamitaj. Impresis la granda ŝanĝo de la urbo dum la lastaj jaroj — de malgranda provinca urbo en la pasinteco, ĝi transformiĝis en modernan distriktan centron kun belaj konstruaĵoj kaj multe da verdaĵo.

Bela, ombra vojetoj kondukas ĝis montodomo „Mladost“. La plej granda surprizo por ĉiu, kiu vizitas printempe por unua fojo tiun ĉi lokon estas la belega sovaĝa plonio, kiu floras en la ĉirkaŭaĵo de montodomoj „Mladost“ kaj „Sokolite“ (la falkoj).

La vespero en montodomo „Mladost“ komenciĝis per interesa programo. Tre bonan impreson faris al ni la versoj kaj la kantetoj de la infana grupo el V. Târnovo.

Bedaŭrinde, tre malofte oni aŭdis Esperantan parolon Vere, ĉeestis precipe novaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne kuragiĝis paroli Esperante, sed la aliaj, pli spertaj ankaŭ preferis krokodili.

Disĝinte, ni promesis, ke dum la estonta renkontiĝo ni parolos nur Esperante!

D-ro Tr. MILEV

OMĜE AL LA 100-JARIĜO DE ERNST THÄLMANN

Esperanto-Asocio de GDR eldonis esperantlingve ilustritan faldfolion pri Ernst Thälmann omĝe al lia 100-jariĝo, kaj lige kun la historia kunveno de la Centra Komitato de Komunista Partio de Germanio (KGP), okazinta la 7-an de februaro 1933. Eldonito: Ernst-Thälmann-memorejo Ziegenhals. Ĉi-sube ni proponas al la atento de la legantoj eltrovaĵojn el ĝia enhavo.

La 30-an de januaro 1933 la plej reakciaj fortoj de la monopola kaj financa kapitalo en Germanio establis sian malkaŝan faŝistan diktaturon. Kunvenoj de laboristoj estis malpermesitaj kaj komunistaj, socialdemokratiaj kaj senpartiaj laboristoj — ĵetitaj en pundojn, malliberejojn kaj koncentrejojn. Furiozis la faŝista teroro.

Kaj tamen la Komunista Partio de Germanio vivis kaj daŭrigis la batalon kontraŭ la faŝista diktaturo.

Unu semajnon pli malfrue, la 7-an de februaro 1933, okazis en la gastejo Sporta Domo Ziegenhals ĉe Niederlehme (Niederlehm), sudoriente de Berlino neleĝa kunveno de la Centra Komitato de KPG, kiun partoprenis proksimume 40 personoj, membroj de CK de KPG, kaj aliaj gvidantaj funkcioj de la partio ĉe kape kun Ernst Thälmann, prezidanto de KPG.

La plimulto de la partoprenantoj en la interkonsilio estis venigitaj al diversaj renkontejoj en Berlino kaj tuj poste pluenkondukitaj al la observatorio Treptow. Du vojaĝaŭtobusoj transportis la partoprenintojn en la kunsido kamuflete kiel ekskursanta societo al Ziegenhals. Kelkaj membroj de la Politika Buroo, inter ili ankaŭ Ernest Thälmann, estis veturigitaj en personaŭtoj laŭ diversaj vojoj al la kunveno. La mastro de la gastejo estis fida partiano Wilhelm Mörschel.

En sia referaĵo Ernst Thälmann montris la vojon de batalo kontraŭ la faŝista diktaturo.

La 3-an de marto 1933 la faŝistoj sukcesis aresti Thälmann. Li eltenis dek unu kaj duonjarian elturmentantan unupersonan areston, torturojn kaj aliajn provojn de liaj turmentantoj, devigi lin al rezigno de lia konvinko. Sed li konservis la fidelecon al la afero de la laborista klaso, de la kontraŭfaŝista batalo. Laŭ ordono de Hitler Ernst Thälmann estis inside murdita.

La ĉambro, en kiu la 7-an de februaro 1933 okazis la neleĝa kunveno de la Centra Komitato de KPG, hodiaŭ estas parto de la Ernst-Thälmann-memorejo. Tabloj kaj seĝoj staras sur sia loko kiel tiam. Sur la muroj troviĝas bildoj de partoprenantoj kaj organizintoj de la kunveno.

La malgranda ekspozicio en la antaŭĉambro informas per fotoj kaj dokumentoj pri la vivo kaj batalo de Ernst Thälmann. Ĉe la bordo de la lago, sub tegmento staras la motorboato „Charlotte“, per kiu en 1933, post la fermo de la neleĝa partia kunsido, multaj el la partoprenintoj estis transportitaj al sekura loko trans la lago de Zeuthen.

En 1976, okaze de la 90-a naskiĝdatreveno de Ernst Thälmann, estis konstruitaj monumenta muro kaj honora korto antaŭ la memorejo, vizitata de miloj da turistoj el GDR kaj el alilando.

„BE“

INTERLINGVISTIKA DIPLOMVERKO

En la Sofia Universitato Kremona Baceva, bakalaŭro pri bulgaraj lingvo kaj literaturo, la 3-an de junio 1986 defendis sian diplomtezon pri la plej gravaj planlingvoj en 19-a kaj 20-a jarcentoj. K. Baceva kompare priskribis kvin planlingvojn: Volapuko, Esperanto, Ido, Okcidenta kaj Interlingua kaj per plua komparo evidencigis la avantaĝojn de la autonoma (skemisma) sistemo de konstruo de planlingvoj kompare kun la naturisma.

Ni kore gratulas la junan interlingvistinon kaj desiras al ŝi pluajn sukcesojn.

„BE“

CSEH-METODO EN NOVA „PROFESIA“ VESTO

La centjariĝo de Esperanto postulas de ni ĉiuj specialan atenton sur diversaj kampoj de nia agado, speciale se temas pri instruado.

La Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kies celo estas eduki Cseh-metodajn instruantojn, konstatas, ke tiuj bezonas ne nur bonan lingvo-konon, sed ankaŭ trejnadon en la metodo mem.

Oni diras, ke „ne estas malbonaj lernantoj, sed estas nur malbonaj instruistoj“. Unu el la kaŭzoj, pro kiuj stagnas la disvastiĝo de Esperanto estas netaŭga instruanto aŭ netaŭga instrumetodo. Cseh-metodo, uzata de bona Cseh-instruanto, donas miraklajn rezultojn. Lernantoj ne malaperas de la kursoj, sed kontraŭe, la metodo allogas novajn kursanojn. Kaj la kurso finiĝas kun pli granda nombro da lernantoj ol kun kiuj ĝi komenciĝis. Kvankam la metodo jam estas aplikata dum pli ol 60 jaroj, tiu fenomeno ankaŭ nuntempe ripetiĝas, kiam bona instruanto gvidas la kurson (ekzistas bedaŭrinde ankaŭ fuŝuloj).

Bona Cseh-instruanto devas ne nur bone koni la lingvon kaj ĝian strukturon, sed (kaj precipe) kapabli komprenigi novajn vortojn helpe de diversaj objektoj, kaj kapabli komprenigi la gramatikon kaj ĝian funkciadon per taŭgaj ekzemploj. Tion oni ne povas proprigi al si aŭtodidakte. Por ebligi al E-instruanto atingi profesian instru-nivelon kaj diplomon, kiu rajtigos lin instrui eksterlande, IEI ne nur revizias la Cseh-kurson, sed ankaŭ funkciigas tri-ŝtupan trejnadon: seminario A (enkonduka), seminario B (pliprofunda) kaj seminario C (diplomiga). Ĉiu seminario daŭras 25 studhorojn. La tuton gvidas kunlaborantino de IEI, s-ino A. Childs-Mee el Roterdamo.

Dum la seminario A la partoprenantoj konatiĝas kun la metodo, teorie kaj praktike, observante lecionojn, kiuj estas gvidataj laŭ ĝi; konstatas ĉu ili taŭgas por tia instruado, ofte konsciigas, ke ilia lingvo-kono ankoraŭ ne sufiĉas por instrui kaj komencas serioze studi la lingvon. Se la metodo konvenas al ili, ili aliĝas al seminario B por ne nur pliprofundi la lingvoscion, sed ankaŭ por studi la metodikon de E-instruado, diskuti instrumalfacilaĵojn, kaj interŝanĝi spertojn. La seminario C finiĝas per 20-minuta provleciono (gvidanta de ĉiu seminariano), dum kiu ekzamena komisiono povas konstati la nivelon de la instruanto kaj ties kapablon uzi la metodon. Dum la seminario C oni ankaŭ konatiĝas kun aliaj rektmetodaj instrumaterialoj.

Inter la esperantistoj ŝvebas la falsa opinio, ke Esperanto estas tiel facila lingvo, ke ĉiu, kiu povas ĝin paroli, ankaŭ kapablas ĝin instrui. Paroli la lingvon kaj instrui ĝin estas du tute diversaj aferoj, kaj plene eraras tiuj, kiuj asertas, ke „por instrui Esperanton oni bezonas koni nur unu lecionon pli ol la lernanto!“ Sekve de tia falsa opinio pluraj komencas instrui, faras tion amatore, ofte malbone, timigas la lernantojn, kiuj, seniluziigitaj, foriras per neniam reveni, aŭ, se ili restas, farigas „eternaj komencantoj“. Por eviti tion, IEI ebligas al kandidatinstruantoj profesiigi en la instruado laŭ la Cseh-metodo.

Kandidatoj, kiuj plenumas la postulojn de la tri seminarioj

— ricevos rajtigilon de diplomita Cseh-instruanto

— estos enskribitaj en la registron de IEI kaj rajtos gvidi Cseh-kursojn aŭ Cseh-seminariojn ie ajn en la mondo laŭ invito de E-grupo, kiuj bezonas helpon tiu rilate

— rajtas profiti de laŭ-Help-Fonduso Andreo Cseh“ ĉe IEI

Por ĵus menciita help-fonduso IEI volonte akceptas financon subtenon de personoj, kiuj opinias, ke la profesiigo de E-instruantoj estas necesa kaj apogenda. Pagoj estas bonvenaj al la poŝtĝironto 508601 nome de HELP-FONDUSO ANDREO CSEH, p/a IEI, Riouw-str. 172. NL - 2585 HW DEN HAAG, Nederlando.

FORPASIĜ GRANDA AMIKO DE ESPERANTO

En sia 78-jara aĝo, en julio j.k. forpasiĝ akademiano VLADIMIR GEORGIEV — la plej elstara reprezentanto de la bulgara lingvistiko, mondfama sciencisto, granda amiko de Esperanto.

Akad. Georgiev estis unu el la eminentaj specialistoj pri la problemoj de la traka skribo kaj etruskologio. Sian sciencsploran laboron akad. VI. Georgiev kunligis kun la pedagogia agado kaj en la Sofia Universitato, kaj en la Bulgara Akademio de Sciencoj.

Pro sia scienca kontribuo al la monda kulturo li multfoje estis elektata kiel membro de pluraj mondfamaj akademioj kaj sciencaj institutoj, kiel honora doktoro de diversnaciaj universitatoj.

Akademiano Vladimir Georgiev havis aparte favoran rilaton al la internacia lingvo Esperanto kaj sindone apogis la Esperanto-movadon en nia lando. La bulgaraj esperantistoj perdis grandan amikon. Esprimante siajn plej profundajn kondolencojn al la familianoj de la kara forpasinto, ili konservas por ĉiam en siaj koroj la neforgeseblan figuron de tiu granda scienculo, humanisto kaj bonkora homo.

„BE“



BELGIO

Jacques Paris (31-jara informadikisto) — B-5054 Noville, 26, rue du Village. Pri biodinamikaj ĝardenado kaj bredado, moderna muziko.

Luc Brahy (13-jara) — B-5101 Loyers Namuro, 10 rue des Glaieuls — kun samaĝul(in)oj.

Gérald Dehaes (13-jara) — B-5100 Jambes Namuro, 15 rue Major Mascaux B^{te} 30 — kun samaĝul(in)oj.

Céline Van Rimpaye — B-5100 Jambes Namuro, rue des Rossignols — pri ĉiuj temoj, tutmonde.

BULGARIO

Du 16-jaraj amikinoj: Stiljana Stiljanova — Jambol 8600, ul. „Graf Ignatiev“ 2, vh. B, et. 6, ap. 18' kaj Anastasia Halačeva — Jambol 8600, ul. „G. Dimitrov“ 75 — pri muziko, literaturo, sporto, PM.

ENHAVO

NANO KJUČUKOV. Granda filo de la bulgara popolo	11
ANGEL TODOROV. Niaj instruproblemoj kaj taskoj	1—2
RADI BANČEVSKI. ISEU'86 — Atingoj kaj problemoj	3—4
HRISTO ORLOVSKI. Unu el la unuaj	5
ARTHUR BAUR. La internacia lingvo en Svislando	6
PETKO ARNAUDOV. Sindona kulturaganto	7
IVAN BUJDOSO, WERA DEHLER. Nova ŝanĉo por terminologio	8—11
VIOLIN OLJANOV. En frata Vjetnamio	8—11
NI RECENZAS	12—13
ENLANDA MOVADO	14—15
*** Omaĝe al la 100-jariĝo de Ernst Thälmann	16
*** Cseh-metodo en nova „profesia“ vesto	16
DEZIRAS KORESPONDI	III
MARIA JANKOVA. Interesa etnografia komplekso	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Todor Jivkov inter junpioniroj

Asen Haĝiev (26-jara) — Sofio 1233, bul. „G. Dimitrov“ 193, bl. 1, et. 16, ap. 153/1 — kun la tuta mondo, pri ĉiuj temoj.

Jordan Saev — Sofio 1220, j. k. „Nadeŝda“, bl. 226 vh. B. — pri filatelo.

SOVETUNIO

Nataŝa Kvitko (15-jara lernantino) — 685001 Magadan, ul. „Najskaja“ d. 10a, kv. 38 — kun samaĝuloj.

Arugdas Kaklauskas (22-jara studento pri robotekniko) — SU-233026, Kaŭnas, str. Demokrata 31-29; srrčas bulgara'n amikojn.

Liljana Vaitkevičiute (22-jara studentino pri historio) — SU-233005 Kaŭnas, P. K. 115 — kun bulgaraj geamikoj.

IRANO

Hasan Asadpur (25-jara) — Tabriz. Post box 57335-1957—deziras korespondi kun pacamikoj.

Ali Zaidmorady — Tabriz — Azarbaygan ŝhargi, kode posti 51549 — pelak 72, kuche Ahmade Zareh (Delbary) k-h Khomeiny — pri diversaj temoj tutmonde.

Cefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Lidia RAEVA (lingva redaktoro), Maria JANKOVA

Redakta komitato: Marin BĀCEV, Mariana ELENOKA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV
Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI
Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.


Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

INTERESA ETNOGRAFIA KOMPLEKSO



Gančo Jordanov ĉe la pordego de la muzea komplekso
Foto: Evelin ZAGOROV

En 1874 — kvar jarojn antaŭ la liberigo de Bulgario elsub osmana juĝo, la fama hungara vojaĝanto, arkeologo kaj etnografo Feliks Kanic vizitis vilaĝon Topĉii, distrikto de Razgrad, situanta en la nordorienta parto de la lando. Ravita de la beleco de tiu loko, li pentris la vilaĝon kun ĝiaj putoj, tie nomataj „gerani“, kun la multaj muelejoj. Bedaŭrinde, el la dek tiamaj muelejoj — kvar ventaj kaj ses akvaj — hodiaŭ restis eĉ ne unu, sed la vizitanto povas ĝui la interesajn rokformaĵojn, de kiuj estis tiel forle impresita Feliks Kanic. Depost 1974 ili estas proklamitaj naturvidindaĵo far la Komitato pri Defendo de la Naturo. Ili prezentas naturan ornamon de la vilaĝo, ja ne hazarde ĉe ilia piedo situas la loka etnografia muzeo.

La vizitantoj de la muzeo abunde informiĝas pri la vivmaniero, tradicioj kaj kulturo de la fama loka loĝantaro, nomata „kapanci“. Laŭ historiaj fontoj de la Dua bulgara ŝtato, jam antaŭ 800 jaroj, ili formiĝis kiel aparta loĝkomuneco. La etimo de „kapanci“ estas la vorto „kapanka“ — loka virina popolstila robo, kies manikaj brodaĵoj estas gutsimilaj (guto: bulgarlingve „kapka“). Guste tiu brodaĵo kaj diversaj lokaj intelektaj simboloj apogas la opinion de prof. d-ro Pjotr Denisov el la Ĉuvaŝa scienca akademio. Li trovis sufiĉe da similaĵoj inter la „kapanci“ kaj la prabulgaroj, venintaj el la Volgo-regiono de Rusujo.

La lokaj kantoj, legendoj, fabeloj kaj poeziaĵoj estas parto de la bulgara folkloro kaj daŭre altiras la intereson de la etnografia scienco. La „kapanci“ bone konis plurajn metiojn: forĝado, selfarado, tinkturado, ĉarpentado, kaldronfarado k. a. Multaj objektoj, ellaboritaj de la lertaj manoj de la metiistoj el vilaĝo Topĉii, troviĝas en la loka muzeo.

Ĝi estas etnografia komplekso, kiu konsistas el du restarigitaj konstruaĵoj de la dua duono de la pasinta jarcento. La unua prezentas tipan loĝdomon — kun dormoĉambro, kuirejo, ĉambro kun tablo aranĝita por kristnaska vespermanĝo, kaj ejo por agrokulturiloj. En la dua konstruaĵo troviĝas konstanta muzea ekspozicio de fotoj, popolkostumoj k. a. En la korto oni povas vidi ankaŭ abelkorbojn, modelon de ventomuelejo, originalan lignan pendohorloĝon — valora donaco de la fama aŭtodidakta majstro Ivan Daskalov, ejon por destilado de brando kaj grenoj.

De la muzea direktoro Gančo Jordanov la sciema vizitanto povas ekscii multon pri la „kapanci“. G. Jordanov naskiĝis en Topĉii antaŭ 39 jaroj — li bone konas la historion de tiu regiono en la distrikto de Razgrad. Fininta la Pedagogian Instituton en Sumen, la fakojn de franca lingvo kaj historio — li okupiĝas ankaŭ pri etnografio, arĥeologio, botaniko, paleontologio kaj konservado de la naturo. Dum pluraj jaroj tiu patriota bulgaro trovis en la keloj de loĝantoj de Topĉii malnovtempajn objektojn por aranĝi la muzeon, kreitan en 1981, lige kun la 1300-jara datreveno ekde fondiĝo de la Bulgara ŝtato. El la rokoj G. Jordanov elfosis utilajn mineralojn, multajn postrestaĵojn de la mezozoiko. Li transformis sian domon en natur-sciencan muzeon, kie same troviĝas interesaj kolektoj de plantoj, insektoj, ovoj de diversaj birdoj, remburitaj bestoj, materialoj pri defendo kaj konservo de la naturo.

Adeptoj kaj amikoj de Esperanto ĉiam estas bonvenaj en la domo de Gančo Jordanov kaj en la etnografia komplekso, ĉar ekde 1954 tiu interesa homo estas esperantisto.

— Iam, — rakontas la muzea direktoro, — Esperanto ŝajnis al mi legendo. Sed poste, kiam per ĝi mi trovis multajn amikojn, mi konvinkiĝis pri ĝia forto.

Se hodiaŭ Feliks Kanic povus denove viziti Topĉii, li ne rekonus la vilaĝon. Sed mi kredas, ke li denove ekdezirus pentri ĝin. La vilaĝaj bildoj ŝanĝiĝis, kiel ŝanĝiĝis la vivo de „kapanci“, hodiaŭ — libera, riĉa kaj feliĉa. La nunaj bildoj same estas pitoreskaj kaj sendube indaj por la peniko de talenta pentristo.

Maria JANKOVA